

PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administreto: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptoj oni ne resendadas.

PRI LA XV.

(Aktualaj kongresdemandoj.)

Nenio eble ilustras la ŝancojn de nia XVa pli bone, ol la registrinda fakto, ke ĝis mezo de februaro kompletigis jam la dua milo da aliĝintoj — unikaĵo en la historio de niaj kongresoj, kiu esperigas, ke la kalkulo je 5—6 mila kongresano ne estos utopio. Efektive ĉiu tago alportas novajn aliĝojn el ĉiuj landoj, kelkaj federacioj anoncis eĉ karavanopan partoprenon kaj la nepre kontentiga evoluado de la kongrespreparoj pravigas la fidon al plena sukceso. Aliflanke ĝisvenis al L. K. K. lastatempe diversaj sugestioj, proponoj, kaj eĉ plendoj, kiuj ja estis jam respondataj de ni private, sed en intereso de nia U. K. estas pritraktindaj ankaŭ publike en nia Esp.-gazetaro por forigi ĉiujn miskomprenojn kaj unuigi ĉiujn fortojn en fidela kunhelpo al feliĉa prosperado.

Grava dubo, kiu kontraŭstaris jam en Helsinki la elekton de Nürnberg, estis, ĉu malfabila sinteno de sinksa Bavara Registaro ne povus malhelpi la alvenigon de kelkaj miloj de fremduloj. La maltrankviliĝo pliiĝis, kiam tiu ĉi registaro, pro progresanta malhavo de nutraĵoj, decidis lastaŭtune denovajn envojaĝajn malfaciligojn, kiuj trovis multopan komenton eksterlande. Speciale la angla kaj franca gazetaroj raportadis pri tiuj okazoj, komparante pli malpli trafe la bavarajn registaron al historio, kiu ja konate ankaŭ detenas ĉiujn ne bonvenulojn per akraj bariloj. Kiel ni jam konstatis en nia dua cirkulero, tiuj ĝeneralaj malfaciligoj ne tuŝos la partoprenontojn je U. K. Laŭ oficiala deklaro de la Nürnberga Urbkonsilantaro, kiu estas laŭ bavara leĝo unusole kompetenta en tiu ĉi grava demando, ĉiu kongresano havos la envojaĝpermeson. Rilate al la restado oni decidis komence, ke ĉiuj kongresanoj el la sama lando pagu kune nur la unuopan kongreskotizon por la tuta kongres semajno. Sed montriĝis poste, ke multaj samideanoj intencas restadi pli longtempe en Bavario, vizitante ankaŭ aliajn vidindajn urbojn ekz.

München, aŭ la belegan bavarajn montegaron. Por eviti al ĉi tiuj gastoj novajn pezajn impostojn, la L. K. K. interrilatis denove kun la kompetentaj aŭtoritatoj kaj atingis aranĝon, laŭ kiu la kongresanoj pagu por trisemajna restado en tuta Bavario proksimume nur kvaronon de oficiala takso, t. e. angloj: 5 ŝilingoj, hispanoj: 6 pesetoj, svisoj: 6 frankoj ktp. Cetere la lasta vorto ne estas ankoraŭ parolita, same kiel ankaŭ de la Germanrespublika Registaro favoraĵoj pri pasvizo k. a. nepre estas atendeblaj. Pri tio ni raportos post definitiva decido.

Multan maltrankviliĝon estigis dualinie, speciale en bonvalutaj landoj, la relative altaj kaj ŝajne malproportiaj kongresaj kotizoj. Bone sciante, ke financaferoj ĉiam iomete nervozigas, ni ne riproĉu tiujn, kiuj pli malpli laŭte plendis kaj atakis la L. K. K.-on, opiniante ĝin ĉefkulpulo en tiu ĉi delikata afero. Tamen ni permesas al ni, por klarigi nian situacion, kelkajn principajn konstatojn, unue: la kotizoj ne estas fiksitaj ekskluzive de L. K. K., sed laŭ regularo kaj interkonsento kun K. K. K.; ambaŭ komitatoj plej detale, zorgeme kaj konsciencie ekzamenis la malfacilan demandon kaj decidis fine laŭ bazo de la XIVa kaj mezseptembraj statoj de la diverslandaj valutoj. La Helsinki'a tabelo estis ja trovinta niascie ĝeneralan konsenton, kaj la ĉiulandaj ekonomiaj cirkonstancoj certe ne pliboniĝis, sed pli-malboniĝis interdume. Kaj efektive, komence neniu protestis kontraŭ la aranĝo kaj ĉio ŝajnis en bona ordo. Nur depost la senekzempla senvaloriĝo de la germana marko oni ekriproĉis pli malpli akre la nunan malproportion kaj sugestis malpliigon de la bonvalutaj kotizoj. Ĉu tiuj ĉi samideanoj pripensis la neeviteblajn konsekvencojn de siaj postuloj? Certe ne! Alie ili devis facile ekoni, ke tia nova aranĝo estigus ĝeneralan konfuzon, multajn kostojn kaj veran fonton de ĉiamaj plendoj. Krom tio la kongresa kaso, ĵus pro senvaloriĝo de la germana marko, des pli neĉese bezonas la kom-

pensigajn eksterlandajn kotizojn por kontpago la fakturojn por starigo de la kongresa oficejo, propagando, paperoj, presajoj, poŝtelspezoj, kongressignoj kaj aliaj necesajoj. Sed kial — oni konkludis — ĵus ni bonvalutuloj estu la viktimoj, dum la aliaj pagas veran bagatelon? Kontraŭ tio ni atentigas, ke laŭ septembra valuto 200 gmk. ne estis bagatela, sed sufiĉe alta sumo, des pli ke la salajroj tute ne plialtiĝis laŭ la ĝenerala plikariĝo. Cetere depost la 1. jan. la L. K. K. kvinobligis la komencan kotizon por malbonvalutuloj, rezervante al si la rajton pri plua plialtigo laŭ progresanta senvalorigo de la germana marko. Trie: La feliĉaj bonvalutuloj ne forgesu, ke ilia ŝajna pliŝarĝo ne pre kompensiĝas per la supre menciitaj konsiderindaj favoraĵoj kaj la malmultekosta restado en la ĉijara kongreslando, dum la malbonvalutaj samideanoj partoprenos la kongreson sub treege malpli favoraj cirkonstancoj. Konsiderante ĉiujn tiujn argumentojn, la L. K. K. je sia sincera bedaŭro principe devis malakcepti ĉiujn petojn kaj sugestiojn pri individua aŭ ĝenerala malaltigo de kelklandaj kotizoj, bone rememorante ke la tuta budĝeta konstruaĵo ŝanceliĝus, se oni elprenus eĉ nur unu brikon. Ni ĉesigis ankaŭ la tradician rabaton por samfamilianoj; kiu familiope povas fari 12—20tagan vojaĝon, tiu povas pagi, laŭ ni, ankaŭ la regulan kotizon. Samkaŭze ni rifuzis la eksperimenton de kelkaj eksterlandanoj, transsendi la kotizon per germanaj bankbiletoj, pagante eĉ laŭ tabelo por malbonvalutuloj. La L. K. K. konfidis, ke la kongresanoj bone komprenas, se ĝi konsekvence firmtenas la kotizan tabelon. Ĉiu helpu, laŭ sia povo, kaj same kiel la L. K. K., tute malegoiste laboras tage kaj nokte por la komuna afero, tiel vi aliaj samideanoj bonvolu meti ĝoje kaj volonte kaj malheziteme vian obolon sur la altaron de Esperantujo. Nur tiamaniere ni evitos zorgigan kongresan deficiton kaj certigos al nia XVa kiel eble plej brilan daŭriĝon.

Sed ĉu ne estas preferinde plisimpligi la multekostajn festaranĝojn, kaj pli seriozigi samtempe la kongreson, akcentante pli multe la laborprogramon? Kontraŭ tio ni permesas al ni atentigi, ke ĉiuj grandaj kongresoj ŝatas brilan festan kadron. La okuloj de la mondo direktataj sur nia XVa juĝos, ne sciante sekvi niajn labor- kaj fakkunsidojn, unualinie laŭ eksterajoj. Ju pli impresiga la tutaranĝo, des pli granda la propaganda efiko. Krom tio post serioza laborado la samideanaro rajtos amuziĝi, kaj multaj feriuoj serĉante distraĵojn preferas manifesti amuziĝante.

Pro tio ni ankaŭ ne povas konsenti la proponon de D-ro Stromboli, kiu proponis malkoncentrigon de niaj universalaj kongresoj.

Ĉia apartiĝo de fakkongresoj estus bedaŭrinda malpliigo de U. K., kiu perdis aliakeze ĉian sciencan kaj praktikan valoron kaj restus fine nura festo. Ankaŭ praktike la propono ŝajnas al ni ne bone efektivebla, ĉar la kongresanoj devus vojaĝi de lando al lando, de urbo al urbo, kio kaŭzus nuntempe multe pli da elspezoj ol la partopreno en unu granda kongreso, kiu unuigas la saminteresulojn sur ĉiuj ajn kampoj. La ĝusta postulo pri pli fruktodona estigo de niaj fakkunsidoj estas pli bone realigebla per zorgema preparado de la tagordo, per elekto de taŭgaj raportanto kaj kunraportanto, per eksigo de nuraj sci-volemuloj, per antaŭa korespondado de la partoprenantoj. Tiusence klopodos la L. K. K. kaj esperas kontentigi samgrade la scienculojn, praktikulojn kaj festemulojn.

Multe pli zorgigas la L. K. K.-on la nuntempa germanlanda kaj tutmonda politika situacio, kiu plimalfaciligas konsiderinde la propagandon kaj palpeble hezitigas la aliĝojn el kelkaj landoj. Sed fine U. K., ja ne estas politika sed kultura afero, kaj estu nia celado akcenti kaj substreki ĉiuokaze la nepolitikan karakteron de nia manifestacio. Esperu ni, ke la minacanta nubaro estos malaperinta ĝis la kongreso, tiel ke rebrilos ridetanta ĉielo sur nia XVa. Kio ajn okazos, la L. K. K. staros firme ĉe la direktilo kaj klopodos per ĉiuj fortoj direkti feliĉe la kongresŝipon en la certan havenon.

Zorgigaj infanoj, laŭ proverbo, faras fine al siaj gepatroj la plej multan ĝojon. Do, ni ne plendu tro laŭte pri okazaj malhelpaĵoj, ĉagrenoj kaj zorgoj! Eble ankaŭ ili kontribuos, post feliĉe superigita krizo pliŝatigi al ni ĉiuj la XVan!

D-ro Richard Ledermann,
prezidanto de L. K. K.

oooo

PRI LA „ULOJ“ EN ESPERANTUJO.

Pri interesaj specoj de esperantistoj skribas »Esp. Praktiko«. Pro la multa vereco de la enhavo ni enpresas la artikolon el la maja numero, parolanta pri »praktikulo« kaj »fantaziulo«.

La unua estas multjara esperantisto. Li havas spertojn lingvaj kaj praktikajn. Li ĉiam kunlaboras en seriozaj aferoj. Li uzas la lingvon tia, kia ĝi estas. Li ne estas fanatika »fundamentano«. Sed ankaŭ reformemulo li ne estas. Li scias, ke nia helpa lingvo evoluas iom post iom. Li akceptas nur necesajn neologismojn. Li ne estas harfendemulo. Li flue parolas la lingvon. Ofte li majstras ĝin. Sed li parolas nur tiam, kiam estas necese. Multe pli li skribas la lingvon. Li faris tion kun avantaĝo en la unua tempo de sia esperantistiĝo. Li estas konvinkita pri tio, ke ankoraŭ nun la sola progreso rezultas el la

konstanta uzado de nia helpa lingvo, sed je bona okazo kaj por taŭga celo. Tiamaniere li sukcesis akiri al si bonan, eĉ bonegan scion de Esperanto. Li prave klopodas pligrandigi la aron da uzantoj perfektaj buŝe kaj skribe. Li tamen ne trotaksas la amason. »Laŭkvalita laboro« estas lia devizo. Li estas nek nura idealisto, nek nura realisto. Li iras la mezan vojon. Li taksas ĝuste la valoron de la ekzamenoj kaj akcelas ilin de l' praktika vidpunkto. Li asimiliĝas al la cirkonstancoj. — Specialan intereson li dediĉas al la propagando. Kun konstanteco li faras ĝin, konvencempe tamen kaj ne tedante. Li elektas sian publikon. La rutino tion ebligas al li. Li regas la sferon. Li ne entreprenas dubajn aferojn. Li serĉas la okazon kaj ekkaptas ĝin. Propagandaj problemoj okupas lin daŭre kaj intense. Post maturiĝo li solvas ilin, unu post la alia. Nesukcesoj ne malesperigas lin. Kontraŭe! Li kalkulas pri ili kaj gardas sin. Lian konvinkon neniu povas ŝanceli. Li scias, ke ne ĉiuj homoj bezonas Esperanton, sed ke la bezonantoj devas esti interesataj. Lia konstanteco estas sekuriga. Kune kun aliaj seriozaj faktoroj liaj laboroj helpas al la progreso de la Esperanto-movado.

Kontrasto al li estas la entuziasmulo. Li eklernis Esperanton nur antaŭ nelonge, apenaŭ konas ĝian esencon. Kredeble li neniam finlernos ĝin. Li krome okupas sin pri 99 aliaj movadoj. Sekve de tio li ne havas tempon por profundigi en la lingvon. Kun nerveciga entuziasmo li »esperantigas« la tutan mondon, propagandas la lingvon tage kaj nokte, pendigas afiŝojn en ĉiuj lokoj, scias ĉion pri la movado, sed nur supraĵe. Speciale pri nombroj kaj statistikoj li estas malcertega. Li ludas kun tro multe da nuloj je ciferoj. Li portas verdan stelon ne nur sur la vesto, sed ankaŭ sur la sultono, la kravato, sur la manumoj kaj je la horloĝa ĉeno. Li estas la plej bona konsumanto de Esperanto-glumarkoj. Ne sufiĉas, ke la entuziasmulo malseriozigas nian propagandon. Ankaŭ inter la esperantistoj mem li estas timiga aperaĵo. Li organizas ĉion. La laboron devas fari aliaj personoj. Li korespondas kun la tuta mondo — malpli serioze kaj eĉ malpli de la lingva vidpunkto. Generale li ankaŭ estas »terura kolektanto«. Li kolektas nur pogrande :kartojn, gazetojn, broŝurojn (prefere senpagajn!). Li skribas ĉien. Karakteriza estas lia malbone legebla skribo. Adreson li principe skribas malklare aŭ glu-kovras ĝin per verdaj steloj nepre necesaj (laŭ li!). Katastrofa estas lia influo al la praktika laboro. Li produktegas ideojn ne efektiveblajn. Kun nevenkebla fervoro li partoprenas en ĉio. Kion seriozaj samideanoj aliloke kun peno starigis per multmonata laboro, li detruas per aro da ilustritaj poŝtkartoj (markoj kompreneble bildflanke!).

Ofte li havas eĉ la kuraĝon, plendi pro nesukcesoj okaze de ignoro. Ofte li tiam fariĝas malĝentila. Li entute malhelpas la movadon. Bedaŭrinde li ne scias tion. Gentilaj aŭ eĉ malkaŝaj atentigoj tute ne influas lin. Li daŭrigas sian agaĉadon. Li timigas kaj forpelas seriozajn interesatojn. Izolado je »konfidita« al li »posteno« ne sufiĉas. Tro ofte oni lin toleras. Fantaziulo devus esti lia titolo. »Fuŝulo« la predikato por lia laboro. Oni sin gardu kontraŭ li kaj plu iru sur la vojo de serioza, ne pedanta laboro por la bono de nia afero! Praktikuloj kaj seriozaj esperantistoj en la diversaj laborsferoj ankaŭ havas entuziasmon, sed prudentan kaj sekve de tio produktigan. Oni sekvu ilian ekzemplon.

OFERO.

El »Bitva stinŭ« (1923) de Josef Šimánek.

Eksilentadis movbruo en la stratoj, la vendistoj demetadis sian komercaĵon sumigante la tutagan profiton, la banejoj ĉirkaŭis trankvilo. Super la urbo ĵus la suno subenigadis, ĉe rando de l' horizonto leviĝadis la stelo de l' Afrodito, kiam statuisto Skopas, morte pala, perdante spiriton, kun filamiso*) negliĝe ĉirkaŭmetita eniris en domon de Hermogenes.

»Mia amatino mortas, Hermogenes! Ĉiuj provoj por helpi tute malsukcesis. Se vi ne savos ŝin, perdita ŝi estas. Ho, ne diru, ke vi ne kapablas revenigi ŝin al la vivo. Vi estas la sola, kiu povas ankoraŭ elŝiri ŝin el Hado**), kaj vi devas fari tion. Vi scias ja, kio estas por mi ĉi tiu estaĵo, sen kiu mia vivo similas al senkonsola dezerto. Mia ekzisto ne havos valoron, se ŝi ne estos savita kaj mi trenos min tra la vivo kiel griza malgrava ombro. Ŝia beleco, unika inter la virinoj, kiujn mia okulo iam ekvidis, min tiom ĉarmis, ke preskaŭ nur en ŝi mi trovas la sencon de l' vivo. Venu, rapidu, Hermogenes, por ke ne estu malfrue. Via patrino estis Persino kaj konis sekretojn de la plej efikaj kuraciloj! Ho, ne neu, ke ŝi konfidis ilin al vi kaj faris vin heredanto de sia granda scio!«

Hermogenes ĉirkaŭmetis brunan fitonon***) kaj silentante montrosiigis al maljuna sklavo du etajn vazojn el fojnika vitro, en kiuj perlobrilis travidebla fluidaĵo. La sklavo transdonis ilin al sia mastro kaj Hermogenes kun la statuisto eliris el domo.

Ejrene kuŝis sur klineo†) tremetante pro malvarmo, malgraŭ varmega somera ve-

*) filamiso, greke filamys, antikva greka mantelo.
**) Hado, greke Hades, postmorta restadejo de animoj.

***) fitono, greke fiton, antikva greka vestaĵo sen manikoj

†) klineo, greke kline, antikva greka ripozlito.

spero. Ŝia orkolora hararo etendiĝadis en brilantaj strioj sur kuseneto formante al ŝia diina kapo molegan ripozilon indan porti belon tiel ravan. Ŝiaj blujaj okuloj rigardegis, ili tamen nenion vidis. Ili estis tute forestantaj por ŝia ĉirkaŭaĵo kaj eĉ ne ekvidis la venantan kuraciston, kvankam li ekstaris tuŝapude ĉe la malsanulino. Febrego metis inter ŝiajn okulojn kaj la realon iun densan irantaron de bildoj kaj vizioj naskiĝantaj el brulumanta cerbo.

Hermogenes ekrigardis en angulon de l' thalamo^{*)} kaj liaj okuloj ekvidis statuon prezentantan Ariadnon, kiu sopiras post Theseo. La ellaboraĵo estis tiel harmonia kaj elokventa en sia koncepto, ke eĉ la senpasia kaj modera saĝulo forgesis sian profesion kaj taskon kaj rigardis ĝin kun mirego kaj pia respekto. Tuta doloro de l' sopiro estis bildigita en vizaĝo de Ariadno per esprimo, kiu superis la plej brilajn kaj perfektajn imagojn. Senmorteco rigardis de sur nealta piedestalo kaj proklamadis la triumfantan kaj ĉion venkantan arton de l' kreinto. Tuta kosmo de doloro kaj de tragediaj esperoj kondamnitaj al malapero estis esprimita ne nur per la okuloj, sed ankaŭ per ĉiu movo de l' korpo plena da funebra kaj grandioza muziko, kiu malfermis tutan misteron de l' belo, de l' amo kaj de l' doloro.

»Ĉu vi savos ŝin?« ploreme demandis Skopas kaj lia rigardo fiksiĝis je buŝo de l' kuracisto kiel okuloj de kondamnito je vizaĝo de juĝisto.

Hermogenes turnis la malsuprajn palpebrojn de l' okuloj de Eirene kaj ekprenis ŝian brakon ĉe manradiko.

Profunda kaj senmova silento plenigis la thalamon. La delikata falado de gutoj en klepsidro^{**)} bruis kiel ektondro de grandega ondo sur furiozanta oceano.

Hermogenes suprentiris la ŝultrojn.

»Mi ne scias. Tamen mi provas. Vi estas glora artisto. Pro via arto mi faros ĉion laŭ mia povo. Sed estas neeviteble necese, ke vi foriru, ke vi lasu min sola kun malsanulino kaj ke vi revenu antaŭ la tagiĝo.«

La voĉo de l' kuracisto sonis senkolora, malvarme kaj severe.

Skopas ekrigaris melankoliege la liton kaj diris:

»Se vi savos ŝin, mi donos al vi tutan mian havaĵon, kiu ne estas malgranda.«

Poste li vualis sin en sian filamison kaj eliris al strato.

*

Kiam Skopas matene revenis en sian domon kun okuloj kvazaŭ frenezaj kaj palegaj

*) thalamo, greke thalamos, antikva greka dormĉambro.

**) klepsidro, antikva greka tempmezurilo.

vangoj, la thalamo estis plenigita de forta bonodora aero, kia blovas en regiono, kies atmosfero estis purigita de forta fulmotondro. Akra refreŝiganta odoro de oksigeno penetradis en liajn naztruojn.

Sur klineo ripozis Eirene spiregante, eniĝinte en profundan sanigan dormon kaj ŝia vizaĝo kovrita de freŝa roza ruĝo esprimadis troabundan sanon. Ŝi personigis la belbrilegan miraklon de netuŝita junaĝo kaj ĝi ŝajnis, kvazaŭ ŝi dum la nokto estus transirinta pli proksime al sia infanaĝo, kvazaŭ ŝi estus reveninta de siaj dudek jaroj al aĝo de dek ses.

Hermogenes, kiu sidis sur rando de ŝia lito, leviĝis, ekrigardis la statuiston per grizaj malvarmaj okuloj kaj diris:

»Via amatino estas savita. Mi redonas ŝin en viajn manojn ankoraŭ pli belan, pli junan kaj pli freŝan ol ŝi estis antaŭ sia malsaneco, kiu ne estis kuracebla per kutimaj rimedoj, eĉ la plej perfektaj kaj miraklaj.

Ŝi estis mortonta, jam ŝi ŝtaris en boato de Haronox^{*)} kaj estis necesa supermezura forto por redoni al ŝi la vivon.

Mi lernis sekreton, kiun neniu el vivantaj kuracistoj konas, kiun mi ne rajtas konfidi al iu ajn, kaj kiun mi kunprenos en tombon.

Ĝi estas la sekreto pri aliigado de fortoj, pri la maniero, per kiu oni povas tute aliigi certajn pensojn kaj fortojn same kiel kelkaj ensekretigoj lertas aliigi la metalojn. La forton de potenca arto, malliberigitan en belega ĉefverko, oni povas elkatenigi, liberigi, ŝanĝi en vivoforton kaj transmeti en nova formo en alian objekton, ĉar ĉiuj fortoj havas la saman devenon malgraŭ supermezura kaj nepriskribebla riĉeco de modifoj, kondiĉita per medio, direkto kaj formo. La forto de dia fajro estis enkatengita kaj malliberigita en via Ariadno, en kiun vi enkorpigis la plej belajn kreantajn kapablojn, enhavantajn ĉiujn kondiĉojn de naskiĝado kaj vivo. Nur ĉi tiu forto povis venki la morton kaj redoni la vivon al via amatino. Ĝi estas via arto, kiu savis ŝin preskaŭ jam mortan. Mi eligis la forton el via plej bela laboraĵo, kiu ne vidos plu la lumon, kaj mi transkondukis ĝin en la sangon de Eirene, kie ĝi nun tondras en plej flamanta junaĝo.«

Skopas rigardis momenton silentante Hermogeneson, lia vizaĝo fariĝis por iu tempo malsprita, senesprima kaj morta. Tuta sango elfluis el ĝi por cedi lokon al pergamena ŝulko plena grizo.

Poste lia rigardo direktiĝis al angulo de thalamo, kie ŝtaris paŝintan vesperon la statuo de Ariadno. Anstataŭ ĝi nun kuŝaciis tie sur ŝtona pavimero ardanta senforma skorio, kovriĝante rapide per cindrogriza

*) Harono, greka mita pramisto en subteraĵo, veturiganta la ombrojn de mortintoj en Hadon.

tavolo kaj el ĝi leviĝadis supren maldensa arĝenta vaporo disvastiganta fortan ozonan odoron.

La vizaĝo de l' statuisto reviviĝis kaj pleniĝis de malhela ruĝo. En lia mano ekbriletis ponardo kaj lia voĉo ekbruegis en thalamo kiel tondrado.

»Vi rajtis preni mian tutan havaĵon; sed kiu donis al vi la rajton detrui — eĉ por prezo savi mian plej karan estaĵon — tion, kio estis havaĵo de l' tuta homaro, kaj kio estis sanktigita de la kreema ideo de dioj mem? Malsaĝulo! Vi oferis al mortemaĵo la senmortemaĵon, vi makulis la netuŝeblan olimpian flamon, vi ŝanĝis oron en argilon, kiu, mi konfesas tion, estas pli belforma! Vi malsaĝa kaj senhonora blasfemanto! Vi ne sukcesis nei, ke barbara sango de Aziano fluas tra viaj vejnoj! Foriru el vivo, kies sencon vi ne komprenis kaj je kiu vi perdis ĉiun rajton.«

Hermogenes ekstertoris kaj falegis teren. Sango fluadis torente el lia brusto kaj formis ĉirkaŭ lia korpo skarlatkoloran marĉeton.

Skopas alvokis sklavojn kaj diris montrante al kadavro de Hermogenes:

»Forportu ĉi tiun korpon kaj enfosu ĝin sub la roko!«

Kaj li eliris el la pordo ne rigardinte al lito de Eirene.

Tradukis Rudolf Fridrich.

ooo

RIEDL L.:

EL LA HOSPITATO.

(Al F. H.)

Ŝi devas morti — ruĝo sur la vango forflugas, cedas, kiel birda ar' plenrevaj planoj kun intima varmo por ĉiam dormas en la monda mar'.

Dormetas, sonĝas en la brusto koro, de l' tago mola brilo kisas ŝin, silentu! — dormas peza la doloro, delonga ŝia sola amikin'.

Dormetas, sonĝas en la brusto koro, pri lumo, suno kantis la anim', pereis ĉio — mole sonas ploro, kaj en animo peza reĝas tim'.

Rapide pasas noktaj nigraj horoj, sonore sonas paŝ' en hospital', malsana dormas, revas por eterne, malplene spiras ĉambro en la val'.

ooo

LA BALO.

La halo hele brilas, al danco logas son', vi, blanka, bela iris, ĉar doĉe vokas ton'.

Ho, masko venas nigra, alflugis kiel muŝ', kaj varme, sorĉe spiras vibranta ama tuŝ'.

Gardeno paŝojn kaŝis, kaj vortojn la fontan', vi ofereme marŝis kun li, ah, man' en man'.

Kaj sonas la muziko, penetras el la hal', kaj ie inter arboj eksonis ampokal'.

Kun vundo en animo mi vagas inter flor', en koro peze vibras la amo kun dolor'.

ooo

MAJSTRO JOHANO HUS.

Honorigu lian helan memoron kaj rakontu al viaj infanoj pri tiu ĉi granda homo, kiu mortis kiel martiro por rajto kaj vero, brulmortigita sur ŝtiparo en Konstanco la 6an julion 1415.

Lia cindro estis ĵetita en Rejnjon, sed memoro je li vivu en ni!

Hus! — Kiom foje oni vokas la nomon en mondspacojn, tiom foje ĝi resonas kiel eĥo ŝanĝita je persono, karaktero kaj agoj.

Voku: Hus! — kaj la mondoj respondos: Giganto! Renesanco!

Sesa julio, en kies antaŭvespero la ĉielo super Konstanco ekbrulis per brilo de flamoj, flagrantaj el lignaro de la ĉefia reformatoro, havas grandiozan signifon por la bohema nacio, kies sincera filo Majstro Johano Hus estis, ĉar honorigi Majstron el Husinec devas la tuta civilizita mondo.

Hus estas limo ne nur inter la epoko, sed ankaŭ inter nacieco kaj kulturo. Per sia prediko li esprimis sentadon, elkreskantan el nacia karaktero kaj je fino de la 14. jarcento ĝi signifas kulturo-superecon de aliaj nacioj.

Hus Giganto! Per ĉi tiu esprimo sin interligas la plej bonegaj ecoj: bonmoro, ne-riproĉebla kondutmaniero, plena, ĉiuflanka kaj ideala justeco, kiel ĝin nur de dio fondita homa animo povas imagi, tiel pura kaj justa, kia estis la animo de Majstro Johano Hus. Pro tio Hus defendis la subprematan boheman nacion kaj malriĉan popolon...

Hus tre amis Ĉeĥojn kaj estimis ilin. Ekrimarkinte penadon de l' malamikoj ekregi la Ĉeĥojn kaj malgrandan kontraŭstaron de siaj samnacionoj, li ankaŭ tiujn ĉi severe kritikis dirante: »La Ĉeĥoj estas pli malbonaj ol hundoj kaj serpentoj; ĉar la hundo defendas sian lokon, sur kiu ĝi kuŝas, kaj kun ĉiu ĝi batalus, kiu volus ĝin forpeli; same la ser-

pento.« — Kaj aliloke diras Hus: »Estus dezirinde, ke princoj, kavaliroj, vladikoj kaj urbanoj uzu sian influon ĉiam kaj ĉie, por ke la bohema afero ne pereu. Se Ĉeĥo edziĝas Germaninon, oni peni, ke liaj infanoj tuj lernu boheme kaj la lingvon ne duigu.«

La bohemeco de Hus ne estis malamo al alinaciano. Li ja diris: »Mi pli ŝatas bonan Germanon ol malbonan Ĉeĥon.«

Hus venkobatalis nek kontraŭ kredo, nek kontraŭ religio; kontraŭe — li konsideris ilin alte super la malklaraj akvoj de malbona vivo.

Perfektan kaj konsciencan oni trovas Hus kiel instruiston, poste rektoron de la bohema universitato en Praha, kiel pastron kaj predikiston en »Betlehema kapelo«, kiel konfidaton de la reĝo kaj de la reĝino.

La bohema popolo preskaŭ adoris Majstron Johano Hus. Oni verkis preĝojn al M. J. H., oni fondis preĝejojn por lin estimi, stampis monerojn kaj sanktigis altarojn. Dum la tuta 15—16. jarcentoj estis 6a kaj 7a julio sanktigitaj festotagoj kaj ankoraŭ en la jaroj 1622—1626 oni trovas ilin ruĝe enskribitaj en kalendarioj.

Kiam ajn roma katolika hierarkio klopodis subpremi la memoron je M. J. Hus, bohemiaj regantaj klasoj ĉiam protestis en parlamentoj kaj intervenis ĉe la reĝo Rudolfo II. (1549 kaj 1608).

Nur per la perforta kontraŭreformacio post batalo sur Bílá Hora (Blanka Monto) kaj per enkonduko de kulto Jan Nepomucký (Johano de Nepomuky) sukcesis al katolika eklezio subpremi la memoron je M. J. Hus.

Hodiaŭ la kulto de Majstro Johano Hus per granda forto revivigas en la bohema popolo kaj la 6a julio fariĝis ree nacia festo kiel sistempe.

Trad. A. Žaludová.

ooo

NEDERLANDANOJ, ĈEĤOSLO- VAKOJ KAJ ILIAJ KULTURAJ RILATOJ.

(Parolado de s-ro Vonka, sekretario ĉe la ambasadorejo en Amsterdam la 25an de marto 1923.)

La kulturaj rilatoj inter Nederlandanoj kaj Ĉeĥoj estas preskaŭ 1000jaraj. La plej malnovaj datumas de la Xa jarcento, kiam la dukoj de la saksa gento fariĝis imperiestroj de Germanujo kaj kiam ili pretendis je rajtoj je la dukregno de Praha.

Ĉirkaŭ jaro 1000 ankaŭ la urbo Utrecht stariis sub potenco de saksa duko kaj tielmaniere oni sciis klarigi, ke la ĉeĥa regnestro Jaromír el la dinastio Přemislidoj vivis jarojn kiel malliberulo de la imperiestro Hendriko II. en Utrechto en jaroj 1012—1031 kaj forlasis la malliberejon, kiam imperiestro Konrad II. liberigis lin. Tiu ĉi imperi-

estro estis enterigita en Utrechto en jaro 1036, kiam la pli juna frato de Jaromír, Oldřich mortis en Praha.

Tiun ĉi regnestron Jaromír oni ne intermiksi kun la heroo de la poemo Jaromír el Praha, kies verkisto estas A. C. W. Staring. Jaromír el Praha estas la persono el la fantazio de la poeto, sed la regnestro Jaromír estas terura ekzemplo de la krueleco de lia epoko: laŭ ordono de lia pli maljuna frato Boleslav III. kripligita (difektita) kaj kiam li revenis en Praha, ankaŭ senigita je sia vidkapablo laŭ ordono de lia pli juna frato Oldřich — li enterigis en Utrecht ĉiujn siajn planojn kaj estis en jaro 1034 mortigita laŭ ordono de Vršovci, sangamikoj de lia gento Přemislidoj.

En la sama tempo magistro Hubaldus de Liège*) havis oficon de regnestra sekretario en Praha ĉe la kortego de Oldřich de jaroj 1008 ĝis 1018.

Je la fino de tiu ĉi jarcento la Nederlandano Herman, naskita en Utrechto, kiu multajn jarojn estis pastro-sekretario de la regnestro en Praha, de Břetislav II., estis elektita kiel episkopo en Praha en jaro 1098.

Tiu ĉi episkopo Herman havis kiel sekretario Ĉeĥon Kosmas, la pli postan kanonikon en Praha. Tiu ĉi Kosmas estas konata sub la nomo Kosmas Pragensis (1045—1125). Li studis en jaroj 1074—1083 en la latina lernejo en Liège, kiu urbo en tiu epoko ankaŭ stariis sub la potenco de la germanaj imperiestroj.

La scienculo magistro Franks estis en Liège la protektanto de Kosmas, kiu post la morto de sia edzino komencis skribi latinan kronikon de la ĉeĥa lando. Tiu ĉi kroniko estas la plej malnova, kiam la ĉeĥa literaturo konas. Kosmas akompanis episkopon Herman dum multaj liaj oficaj vojaĝoj. Tielmaniere oni sciis klarigi la profundan scion de Kosmas.

En jaro 1310 Johano, filo de duko de Luxemburg kaj imperiestro de Germanujo, estis elektita kiel ĉeĥa reĝo. De tiu tempo la rilatoj inter la Ĉeĥoj kaj la okcidentaj nacioj fariĝis pli intimaj, ekz. kiam la nepino de ĉeĥa reĝo Karolo, filo de Johano de Luxemburg, edziniĝis kun la duko de Brabant. Sia dua edzo estis la grafo de Holland, kies rezidenco estis Hago.

En la komenco de 15a jarcento, speciale post jaro 1415, t. e. post la jaro de la morto de Jan Hus, multaj Nederlandanoj stariis sub la influo de la Husitismo. Multaj prelatoj, kavaliroj kaj civitanoj eliris por batali kontraŭ la Husitoj, sed multaj revenis kun simpatioj pli grandaj por la skismoj ol por la eklezio, sed ili eniris la militon kontraŭ Žižka, la ĉefo de la Husitoj.

*) Liège — urbo en Belgujo, tiama Hollando.

Tiel ni komprenis, ke multaj Nederlandanoj vivis en Bohemujo. Jakobus Kanter el Groningen vivis kiel poeto en la ĉeĥa nobela familio Rosenberg en Sud-Bohemujo. Jakobus Kanter estis humanisto, poeto kaj aperigis en Bohemujo latinan panlirikon, dediĉitan al la familio Rosenberg, nomitan »Rosa rosensis« (1440).

En la sama tempo restadis en Praha ankaŭ la Nederlandano nomita Adriaan van der Ee, reprezentanto de la germana imperiestro Frederik II., kiu gvidis dum multaj jaroj la diplomatikajn rilatojn inter la ĉeĥa ŝtato kaj la germana imperiestro, precipe en jaro 1447, kiam la ĉeĥa reĝo Albrecht de Habsburg mortis kaj lia filo Ladislav, kies patrino estis ĉeĥa reĝino kaj nepino de imperiestro Karolo I., estis ankoraŭ infano.

Tiutempe restadis en Praha la reprezentanto de la Burgondia kortego van Hesel (1446), ĉar por la duko ekzistis eblo esti elektita kiel ĉeĥa reĝo.

Sed en jaro 1457 la Ĉeĥoj elektis kavaliron Jiří de Poděbrady kiel reĝon. Li estis tiel nomita Husita reĝo, vere ĉeĥa nacia reĝo.

Jiří ekintencis fondi Ligon de popoloj, inter kies membroj ne plu estos milito. Por tiu celo Jiří sendis mision al ĉiuj kristanaj landestroj en Eŭropo. Ĉe tiu misio estis ankaŭ ĉeĥa kavaliro, kiu poste kiel grizulo donis priskribon pri tiu ĉi granda mondvojaĝo. Li rakontis, ke la ĉeĥa misio estis prezentata en la rezidencoj de la regnestroj de Brabant kaj Flandrujo. En interligo de tiuj ĉi aŭdiencoj — li skribis — la misio ankaŭ estis akceptita de iu grafo en la ĉirkaŭaĵoj de nomitaj provincoj. La kastelo de tiu ĉi grafo — rakontis la kavaliro — troviĝis en la proksimeco de la arbaro. El la fenestroj oni vidis digon, kaj post la aŭdiencoj la misio veturis al la maro tial, ke la maro ne estis malproksime de la rezidenco. Oni vidas, ke la priskribo ne estas sufiĉe klara, sed ekzistas la supozo, ke la Ĉeĥoj vizitis la hollandan grafon Johan van Holland en Hago.

Pri tiu ĉi plano de Jiří de Poděbrady skribas T. G. Masaryk en j. 1922: »La maljuna ĉeĥa nacia reĝo Jiří de Poděbrady propagandis la eternan pacon kaj antaŭenmetis la programon de eterna paco inter nacioj, kiam Eŭropo ŝanceliĝis sub la sinsekvo de Husitaj militoj, same kiel ĝi nun ŝanceliĝis. La milito en jaro 1914 ne nur igis ŝanceliĝi Eŭropon, sed la tutan homaron. Mi kredas, ke por la realigo de la idealoj de Jiří de Poděbrady ne ekzistas pli favora tempo ol en niaj tagoj. Tiu idealo devas esti la celo de ĉiu kaj de ĉiu nacio.«

Post la morto de Jiří de Poděbrady la Ĉeĥoj havis du reĝojn de pola deveno kaj oni scias nenion pri la rilatoj de Ĉeĥoj kaj

Nederlandanoj. Sed pli poste la rilatoj fariĝis pli intimaj. Imperiestro Ferdinand I. vokis en jaro 1566 la Ordenon de la Jezuitoj al Praha. Ses de la unuaj Jezuitoj, kiuj alvenis al Praha, estis de nederlanda deveno. Ilia gvidanto estis Petrus Canisius el Nijmegen. Kiam ili alvenis al Praha, ili estis akceptataj de la popolo kun granda malamo, tial, ke oni vidis en ili la fidelajn servistojn de la malamika dinastio de Habsburgoj.

Antaŭ ol 50 jaroj pasis, la Jezuitoj fariĝis la regantoj de la ĉeĥa universitato en Praha, kiu sub ilia gvidado estis ŝanĝita en germanan universitaton. Same kiel la universitaton ili ankaŭ regis la lernejojn en la ĉeĥa lando, kiuj estis germanigitaj. Per la influo de la Jezuitoj la tuta loĝantaro en la ĉeĥaj landoj, kvankam 90% protestantoj, estis devigitaj al katolikismo.

Wilhelmo de maljuna de Nassau fondis en Heilbron latinan lernejon. En tiu ĉi lernejo studadis multaj studentoj el Bohemujo, membroj de la eklezio de Ĉeĥaj fratoj, inter ili ankaŭ Karel de Žerotín, kiu kun Wilhelmo la Silentulo estis persone konata. Laŭ rekomendo de Karel de Žerotín estis akceptita en tiun ĉi lernejon Jan Amos Komenský, kiu en jaro 1613 por la unua fojo venis en Nederlandon. Kiam li reiris al Praha, li aĉetis en Germanujo la manuskripton de la verko de Kopernikus: »Revolutionibus orbium coelestium«, kiu pritraktis la movadon de la ĉielaj korpoj (astroj). Komenský skribis sian aŭtografion sur la libron kaj tiu ĉi aŭtografio kaj la teksto estas la plej malnova, kiu Ĉeĥoj ĝis nun konas de la mano Komenský. La Kopernikus manuskripto troviĝas nun en Praha kiel propraĵo de la universitato de ĉeĥa nacienco!

La duan fojon venis Komenský en Hollandon en jaro 1625 kun speciala misio por la lasta reelektita ĉeĥa reĝo Frederik van der Falts, kiu post la batalo en jaro 1620 restadis en Nederlando.*»La vizioj de Kotterus«, kiu parolas pri la granda venko de la protestanta eklezio kaj pri la gloriplena estonteco de Frederik van der Falts.

Kelkaj parolas pri Komenský — koncerne lian kredon al viziaj profetoj, kiel ekz. Kotterus, Drabík kaj Kristina Poniatovská — kiel pri manko kaj ne pura scienca pensado. Sed oni ne forgesu, ke en tiu tempo de religia movado multaj kredis al tiaj viziaj profetoj, kiel ekz. la astronomo Newton; kaj la astronomo Kepler okupis sin per astrologio.

En tiu tempo vivis en Hollando multaj Ĉeĥoj. Tiel ekz. en Hago vivis la korporacisto de Frederik van der Falts Andreas Haberwesel van Haben-

* Komenský alportis al li la manuskripton.

feld. Kvankam li havis germanan nomon, li estis Ĉeĥo. En jaro 1622 li aperigis latinan libron: »Hierosylima Restitute« (La renovigita Jerusalem) en Leyder. Ĉe la fratoj Elzevir en Leiden aperis ankaŭ »Bellum Bohemicum«, t. e. »La ĉeĥa milito« (1617—1620) de lia mano. Tiu libro aperis en jaro 1645.

La fratoj Elzevir intencis en tiu ĉi tempo eldoni enciklopedion. En tiu verko parto estis dediĉita al ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo. La artikolon pri la ĉeĥa ŝtato verkis ĉeĥa ekzilito en latina lingvo. Lia priskribo donas bildon de cirkonstancoj en Bohemujo en epoko proks. 1660 kaj estas egala bildo de la vivo kaj morto de la Ĉeĥaj fratoj, de kiu Komenský estis la lasta spirita gvidanto.

En Amsterdam vivis alia ĉeĥa scienculo Dr. Jakobus van Kutná Hora, t. e. van der Berge, kiu en jaro 1624 publikigis la historion de la eklezio en Bohemujo en latina lingvo.

De jaro 1623 vivis en Amsterdam Paul Felgenhauer, Germano el Praha. Li estis verkisto de kelkaj libroj, kiuj estis konsiderataj kiel socianaj. Sekve de tiu doktrino Felgenhauer estis ekzilita el Nederlando.

En tiu ĉi urbo vivis la bonega ĉeĥa pentristo — gravuristo Václav Hollar de Praha — Bohemus, kiel li volonte nomis sin. Ni konas de lia mano du kolektojn de Hollandaj ŝipoj »Navium figurae«. Ĝi estas la ŝiparo, per kiu la nederlandaj Remonstratoj forveturis al Ameriko. Inter ili estis kelkaj ĉeĥaj familioj, ekz. Aug. Herman, pli poste kunlaboranto de la kvakero William Pen. Alia pentraĵo bildas la »Naves Mercatotiae Hollandicae« kaj »Naves bellicae«.

En jaro 1622 la imperiestro Ferdinand II. donis privilegion al sindikato en Praha anstataŭ la malnovan monunuon per nova. Ĉefo de tiu sindikato estis la guvernisto de Bohemujo la regnestro Lichtenstein kaj membro de tiu ĉi sindikato estis Johano de Wit, komercisto de nederlanda deveno, kiu jam antaŭ de milito en jaro 1618 loĝis en Praha kaj kiu estis tre konata en financaj rondoj.

Tiun ĉi de Wit oni ne intermiksi kun konsilanto Johan de Wit, ĉar tiu ĉi neniam estis en Praha. La nova monunuo signifis grandan inflacion, je kiu sekvis bankroto.

En jaro 1645 Komenský venis la trian fojon al Hollando, kiam li iris de Londono al Hamburgo. Komenský kunportis la manuskripton de sia verko »Via lucis«, t. e. »La vojo al la Lumo«. Tiun ĉi social-pedagogian verkon oni konsideros kiel antaŭ-iranto de tiuj, kiuj havas la ideon pri la Ligo de nacioj. Tiu ĉi verko pruvas, ke Komenský ne estis sole fama pedagogo, sed ankaŭ malproksimvidanta sociologo kaj politikulo.

La kvaran fojon Komenský venis al Nederlando en jaro 1656 kaj restis ĝis sia morto

en jaro 1670. Laŭ legendo li vivis en la domo »kun la kapoj« sur Keizersgracht (Imperiestra kanalo N-o 123) en Amsterdam.

La Rotterdama libraro kaj amiko de Komenský Frans Hoogstraaten eldonis tradukon de la teatra verko de Komenský »Diogenus Cynicus Redivivus«. Tiu ĉi verko aperis en jaro 1658 ankaŭ en Amsterdam ĉe Petro van der Berge, kiu en jaro 1661 por la unua fojo publikigis tute la ludon de Komenský »Abrahamus Patriarch«. Post la morto de Komenský aperis en Amsterdam liaj kunigitaj pedagogiaj verkoj en modeleldono en latina lingvo. Tio okazis en j. 1683.

En Zeist apud Utrecht ekzistas religia komunumo de la Moraviaj fratoj, kiu estis fondita en 1746 de la saksa grafo Zinzendorf.

Ludoviko de Zinzendorf estis elektita de la nepo de Komenský — Figulus Jablonensis — kiel spirita gvidanto de la disigitaj Moraviaj fratoj.

La renaskiĝinta Unio de Moraviaj fratoj dediĉis sin sole al la misio-laboro. En Zeist ekzistis la stacio por la misiistoj. Inter ili estis la unuaj, kiuj disvastigis la Evangelion al la Indianoj en Nord-Ameriko kaj al la Eskimoj en Grenlando, misiistoj de ĉeĥa deveno.

La nomita nepo de Komenský Daniel Ernest Figulus Jablonensis estis la fondinto de la Akademio de Berlino. Li estis la filo de la sola filino de Komenský, kiu postvivis sian fraton kaj fratinojn.

Estas vere interese scii, ke posteulo de tiu ĉi Figulus en tiu ĉi momento vivas en Praha en servo de Ĉeĥoslovaka respubliko kaj el Johanisburgo en Sud-Afriko estis revokita al Praha.

Post la morto de la imperiestro Karolo VI. la imperiestrino Maria Terezia devis defendi sin kontraŭ multaj malamikoj. En tiuj ĉi defendaj militoj la urbo Praha estis ofte sieĝata kaj venkata de Bavaroj, Francoj kaj Prusoj. La soldatoj rabis kaj ŝtelis en la urbo kaj vendis siajn ŝtelaĵojn al la Hebrea popolo en Praha. Pro tio Maria Terezia kiam ŝi venkis, eldonis dekreton je 18a de decembro 1744, ke la tuta Hebrea popolo devis forlasi Prahon fine de januaro 1745 kaj Bohemujon fine de julio 1745.

Vane la nederlanda ambasadoro en Vieno klopodis protekti la Judojn, sed kiam tio ne sukcesis, multnombraj Judoj foriris el Praha kaj Bohemujo al Hollando kaj speciale al Amsterdamo, kie ili malfermbrake estis akceptitaj. La streĉo inter la Judoj kaj la registaro estis komprenebla, ĉar je proks. 1700 ili estis terure persekutataj pro ilia religio.

En la tempo de la regado de Maria Terezia vivis en Vieno iu Gerard van Swieten el Leiden. Li estis korpo-kuracisto de M. Terezia kaj post sia morto li estis konsilanto

de la imperiestro Josef II. Sekve de la proponoj de van Swieten la imperiestro Josef forprenis la potencon de Ordeno de Jezuitoj super la universitato.

La universitatoj ricevis pli da libereco, filozofiaj prelegoj ĉe la universitatoj estis permesataj kaj van Swieten sukcesis allasi en Aŭstrio la libron de Montesquieu »L' esprit de lois« kaj sekve de tiu ĉi spirita libereco estis eble, ke kelkaj scienculoj de ĉeĥa deveno komencis rekreskigi la ĉeĥan literaturon (Dobner, Dobrovský, Jungmann, Thám kaj aliaj).

La t. n. renaskiĝo de la ĉeĥa popolo oni povas indirekte ligi kun la nomo de van Swieten. Kion la Hollandanoj faris al la Ĉeĥoj en jaro 1566, tion rebonigis alia Hollandano.

En la 17a kaj 18ajarcentoj pluaj nederlandaj familioj ekloĝis en Bohemujo, aklimatizis sin, germanigis sin kaj plue ĉeĥigis sin.

Du el tiuj nomoj apartenas al la ornamoj de la ĉeĥa literaturo kaj pentroarto: nome Julius Zeyer (1841—1901) kaj Hanuš Schweiger (1854—1912), la unua romanverkisto kaj romantika poeto, lasta pentristo.

En la jaro 1860 la ĉeĥa komponisto kaj muzikisto František Škroup estis nomita kiel direktoro de la nacia opero en Rotterdame. Dum sia restado en Rotterdame verkis Škroup je la germana libreto la operon »Meeresgeuzen« (hol. »Wattergeuzen«). Tiu ĉi poeto pritraktas la liberigon de la Nederlandanoj per la herooj de urbo den Briel en jaro 1622.

Antaŭ 60 jaroj tiu ĉi opero estis kun sukceso ludata. Dum Kristnasko 1861 Škroup estis kun sia familio en Parha. Dum sia reiro li malvarmumis, estis la tutan monaton januaro malsana kaj mortis la 7an de februaro 1862 kaj estis enterigita sur la ĝenerala tombejo en Rotterdame. Nur lia plej juna filo, membro de la Opero-orĥestro en Rotterdame, ĉeestis lian enterigon.

Dum la tempo la monumento de Škroup malaperis kaj nunmomente oni ne kapablas fiksi la lokon de la tombo de Škroup.

La Ĉeĥoj dankas al Dr. van Hamel, direktoro de la biblioteko de la paĉpalaco en Hago, la fikson de la domo, kie Škroup mortis kaj la malkovron de la dokumentoj de Škroup, kiuj troviĝas en muzeo en Rotterdame.

La Ĉeĥoj alte taksas la rememoron de Škroup tial, ke Škroup estis la komponisto de la plej malnova ĉeĥa opero, kiu unuan fojon en jaro 1834 estis ludata.

Krom tio la Ĉeĥoj dankas al Škroup la melodion de la kanto »Kie estas mia domo, mia patrujo«, kiu dum la tempoj fariĝis la nacia himno de la Ĉeĥoslovaka respubliko.

Parolante pri muziko ni ne forgesu la Ĉeĥojn, kiuj popularigis la ĉeĥan muzikon en

Nederlando, speciale la arton de Smetana kaj Dvořák.

Specialan signifon por la Ĉeĥoj havas la urbo Rotterdame, ĉar en tiu ĉi urbo en Hotel Wlamar, la unua prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko T. G. Masaryk intencis en oktobro 1914 komenci la batalon por la liberigo de la Ĉeĥoj kaj Slovakoj.

Masaryk akompanis iun damon el sia familio, kiu damo estis de nederlanda deveno, al Rotterdame. Ĉe tiu ĉi okazo li interparolis kun kelkaj anglaj politikuloj kaj sekve de tiuj ĉi interparoloj Masaryk venis al la konvinko, ke la horo batis.

Masaryk, riĉa je spertoj kaj vasta scio pri la cirkonstancoj de aferoj, sukcesis realigi la intencon, kiun li ekhavis en Rotterdame, kun helpo de miloj da bonvolaj kunlaborantoj.

Nun oni certe scias laŭ la ĉi-supre nomitaj faktoj, kial la simpatioj de la Ĉeĥoj por la Nederlandanoj estas tiel altaj kaj koraj.

La Ĉeĥoj ne riproĉas al la Nederlandanoj, kion faris Petrus Casinius el Nijmegen. Kontraŭe ili alte taksas la rememoron de la samtempuloj de Komenský. Ke Komenský pro ilia nobla kor-inklineco povis pasigi siajn lastajn jarojn en Nederlando. Kun simpatio la Ĉeĥoj rememoras Gerard van Swieten kaj ke en Nederlando al Škroup estis donata la okazo por nobla aktiveco kaj profunde kortuŝita ili rememoras, ke en Nederlando estis faritaj la unuaj paŝoj de Masaryk, kiuj kondukis al la liberigo.

ooo

Dr. Stan. Kamaryt:

ALDONOJ AL VORTARO DE KABE.

Fundamenta vortaro de esperanto estus vortaro, kiu enhavus ĉiujn radikojn esperante difinitajn kaj per ekzemploj klarigitajn. Estus tasko de la Lingva Komitato aperigi tian kompletan kolekton de vortoj, kiu enhavus ĉiujn rekomendatajn aŭ oficialigitajn radikojn. Estas kompreneble, ke tia laboro oficiale ne povas aperi ankoraŭ hodiaŭ. Estos ja antaŭe bezone, ke oni kribru la ĝis nun oficialajn radikojn kaj oficialigu la mankantajn aŭ pli taŭgajn formojn. La tria oficiala aldono certe tre dokumentas la netaŭgecon de la labormetodo de L. K. Ĝi ja simple por resti fidela al la nesincera teorio, ke L. K. ne devas konduki sed ekskluzive konstati, oficialigas ofte formojn, kiuj laŭ uzado jam fariĝis arkaismaj. La akademianoj ŝajnas kredi, ke konstato de malsaĝo aŭ netaŭgeco transformos ilin en saĝon kaj taŭgecon. Sed tamen ili ofte oficialigas sole siajn personajn plaĉojn; kiel alie oni klarigus oficialigon de la vorto »bareliefo«. Kiam oni oficialigos »oreliefo«? Kaj ĉu ne estas danĝere ridinda oficialigi la vorton »uk a z o«?

Per tio ne estas nature dirite, ke la oficialaj prilingvaj publikaĵoj ne meritis gravan atenton, aŭ ke mi neus la neceson, ke la unuaj laboroj devas esti faritaj private. La neoficialulo pli facile portas kritikon, kiu eĉ malutilus al la oficiala institucio. Tial ne estas mirinde, ke la unuaj vortaroj de fundamenta karaktero estas laboroj privataj: »Plena vortaro esperanto-esperanta« de E. Boirac el j. 1909 kaj »Vortaro de esperanto« de Kabe el j. 1910.

De tiu tempo evoluadis daŭre la radika trezoro de nia lingvo tiel, ke la du poste aperintaj oficialaj aldonoj enhavas vortojn, kiuj mankas en la cititaj verkoj. Tial mi elserĉis ilin kaj provis difini ilian senperan sencon, t. e. enhavon de la ideo per ili esprimita kiel eble plej klare, kaj montri krom tio ilian signifon per frazoj. Mi esperas helpi per tio al ĉiuj, kiuj havas intereson pri evoluo de nia lingvo al lokigeo kaj precizeco.

Mi enskribis en la liston ĉiujn radikojn el la Aldonoj, kiuj ne estas en Kabe, aŭ kiuj estas en ĝi aliforme (ekz. verba radiko anstataŭ substantiva k. s.). Entute ili estas 68. Per steleto mi montris tiujn radikojn, kiuj mankas en Boirac (entute 7), kaj per du steletoj, kiuj estas en ĝi en aliaj formo aŭ signifo (entute 9).

Adicii. Kalkuli sumon, kiu rezultas el kunigo de samkvalitaj kvantoj.

— Adiciu la sekvantajn nombrojn! Adicio estas la plej fundamenta kalkula operacio. Adiciante al kvar kvin oni ricevas naŭ.

Aflikti. Kaŭzi suferon, doloron, turmenton, malĝojon al iu, aŭ al sia propra korpo aŭ animo.

— Neagrablaj hazardoj daŭre afliktas nin. Aflikti la virinon, kiun oni amas, estas krimo. Ŝi estas efektive tre aflikata.

Anagalo (bot.). Vegetaĵo el la familio Primulaceoj. (Anagallis phoenicea.)

* **Arbitracio.** Decido de ia grava malkonsento de juĝanto elektita de disputantaj partioj. — Post la mondmilito estis la Danuba ŝiparo dividita inter la novaj ŝtatoj per arbitracio. Pri kelkaj ŝanĝoj de ŝtatlimoj oni decidis arbitracie.

Ardi. Esti daŭre en alta temperaturo kaj lumi dum tio.

— Fadenon en elektra lampo ardas. Ardanta fulgo ilugis el la kamentubo.

Bareliefo. Skulpturo, kies figuroj kaj elementoj malmulte, ne pli ol duone, elpenetras el la bazo.

** **Binoklo.** Malgranda duobla teleskopo, kiun oni uzas en la teatro aŭ dum turistaj ekskursoj.

— Bonaj binokloj povas esti prunte ricevitaj en vestejo de la teatro.

* **Ĉifro.** Signo de sekreta skribo, kiun povas legi sole persono scianta ĝian signifon aŭ sistemon de ĝia uzo.

— Diplomataj sciigoj estas iam skribitaj en ĉifroj. Oni devas ilin deĉifri. Ĉifrita telegramo.

Dalio (bot.). Vegetaĵo el familio de Erikaceoj, gento Rhododendroj. (Ledum.)

— Iu speco de Dalio kreskanta en Norda Ameriko estas vulgare nomata »Labradora teo«.

Decigramo. Dekono de gramo.

Dekalitro. Deko da litroj.

Demagogio. Klopodo fariĝi ĉefulo de la popolamaso pro slaj grandaj paroloj aŭ promesoj kaj tiri el tio profiton.

— Demagogio ne decas al sincera popolkondukanto, sed ofte estas eĉ al li bezona. Demagogia parolo.

Demonstracio. Montro, ke ia opinio aŭ juĝo estas ĝustaj aŭ veraj (ofte laŭ dedukta metodo).

— Demonstracio de la Pythagora temo estas ĝia desegno. Demonstraciu vian aserton!

Digno. Respekto, kiun iu meritas; kondutmaniero, kiu postulas la respekton.

— Kompromiti sian dignon. Lia konduto ne estis digna de lia alta socia posteno. La reguleco de moroj kaŭzas dignon de la virino.

** **Disĉiplo.** Partiano de ia scienca, filozofia aŭ arta tendenco aŭ sistemo nomita laŭ sia fondinto. Sekvanto de ies instruo.

— Plato estis disĉiplo de Sokrates. Disĉiploj de Einstein firme kredas lian teorion. Disĉipla kredo al la majstro kelkafoje eĉ ne volas aŭdi kontraŭargumentojn.

Epifanio (rel.). Festotago de Sanktaj tri reĝoj, kiam Kristo manifestis sin al la popoloj. (6. jan.)

— Epifania vespero estas kunigita kun multaj superstiĉoj.

Erudicio. Tre detala instruiteco en iu fako aŭ tre vasta informiteco en formala scio.

— Erudicio fakula estas sekvo de daŭra zorgema praktikado de iu scienco. Sen peno oni ne akiras la erudicion.

Etiketo. Reguloj de la kondutmaniero en la societo.

— Ĉe la imperiestra korto estis etiketo tre severa. Ankaŭ en la vilaĝoj ekzistas etiketaj reguloj, diferencaj de la urbaj.

Evolui. Pasi tra diversaj laŭgrade kunigitaj ŝanĝoj kaj veni tiel al ia pli alta aŭ pli malalta formo.

— La animo de infano evoluas per instruado. La organika vivo evoluis el primitiva al la komplika statoj. Evolua problemo. Evolui de la ŝtato ne signifas ĉiam plibonigon de ĝia stato.

Falango. 1. (Mil.): Korpuso de militantoj aŭ batalantoj. **2.** (Anat.): Parto de fingro, kiujn ĉi tiu havas tri.

— Niaj falangoj estis ne trapenetreblaj. Revoluciaj falangoj. — Sur la unua falango estas ungo. La fina falango estas la plej mallonga.

Ferio. Libertempaj tagoj dum kiuj oni ne laboras por salajro aŭ por gajno.

— La tuta lernejo ĝojas je ferioj. Ie la leĝo mem garantias al la dungitoj ferion.

Feŭdo. Posedaĵo donita de posedanto por daŭra uzo al iu kiel rekompenco de servoj aŭ por postuli pro tio ian helpon dum

estonteco. Tia transigo de posedo ofte okazadis en la mezepoko.

— Estis feŭdoj laikaj kaj ekleziulaj, personaj kaj familiaj, reĝaj kaj nobelulaj. Feŭda sinjoro.

Fuko. Mara vegetaĵaro, kiun la maro elĵetas sur bordojn.

**** Furoro.** Montro de grandega aprobo, brua aŭ ventega proklamo de konsento, laŭdo, amika envio.

— Ŝia nova tualetto elvokis furoron. La parolanto elvokis eksplodon de furora simpatio.

Galanto (bot.). Vegetaĵo el la familio Amaryllidaceoj, floranta en vintro (Galanthus nivalis).

Heliotropo. 1. (Miner.) Duongema mineralo, speco de amorfa kvarco. 2. (Bot.) Speco de Borogacoj (Heliotropium).

Ilekso (bot.). Arbo kreskanta en Suda Ameriko el la familio de Iiaceoj.

— Folioj de unu speco de ilekso (Ilex paraguayensis) estas uzataj por fabriko de la mateo.

Indiki. Montri la gradon de iu mezurilo, la koncernan kvaliton de ia tuto, la personon koncernan en iu aro.

— Barometro indikis 735 mm. La publika opinio indikis lin mortiginto. En perioda sistemo estas indikitaj atompezoj de la elementoj.

**** Indukti.** Elirante el la konkretaj opaj faktaj trovi regulecojn aŭ leĝojn pli ĝeneralajn.

— La kemia leĝo pri konstantaj proporcioj estas induktita el multaj laŭkvantaj analizoj. Bacon estas patro de la indukta metodo.

**** Intervjui.** Interparoli kun konata persono por ricevi ĝian opinion pri publike interesaj problemoj.

— Oni ofte intervjuas ministrojn. La konataj personoj estas ofte ĝenataj per petoj por intervjuoj. Intervjuanto. Intervjuisto.

Irido (bot.). Vegetaĵo, tipa speco el la familio de Irideoj. (Iris.)

Jesuo. Nomo de fondinto de la kristana religio.

— Estu laŭdata nia Sinjoro Jesuo Kristo. Vortoj de Jesuo.

Judo. Membro de la antikva nacio vivinta en Palestino.

— Judoj vivas nun sur la tuta mondo.

*** Katekisto.** Kiu instruas katekismojn.

— Ĉiu eklezio havas proprajn katekistojn.

Katekizi. Instrui verojn de la religio precipe la elementajn.

— Apostoloj katekizis la kristanajn verojn unuaj.

Komandito. Kunposedanto de komerca entrepreno, kiu garantias per sia tuta posedaĵo (speciala formo de komuna entrepreno, difera de akcia societo).

— La firmao estas nun bonega, ĉar konata milionulo fariĝis ĝia komandito. Komandita societo komerca.

Kompromiti. Kaŭzi malbonan famon de iu per ia ajn maniero.

— La plej grava kompromito de politikisto estas pruvo, ke li akceptis monon por sia

parlamentara voĉdono. La virinon oni kompromitas rakontante malkaŝe ŝiajn amajn aventurojn.

**** Konfidenca.** Kion devas scii sole personoj elektitaj aŭ pro sia ofico aŭ pro aliaj kaŭzoj

— Konfidenca informo donita al sekretario de la ministro. Li diris tion konfidence al iom tro multaj personoj, ke la afero ne povis resti sekreta.

*** Konkordo.** Konsento koncerne pritraktataj faktaj aŭ koncerne rimedoj por plenumi la komunajn celadojn kaj efektiviĝi komunajn tendencojn.

— Ofte estas la konkordo simpla senenhava devizo. Pro konkordo malgrandaj aferoj kreskas, pro malkonkordo la grandaj disfalas.

**** Kontribui.** Helpi en pagado, pagi parton de la ŝuldata aŭ bezona sumo, pagi imposton militan.

— Kontribui por unu triono. Lia kontribuo al tiu elspezo ne estis grava. La venkinto postulas kontribuon.

Lamao. Pastro de diversaj eklezioj budhismaj.

— Budhisma eklezio en Tibeto estas nomata lamaismo.

Lekcio. Parto de instruo dividita laŭ enhavo aŭ laŭ tempo. Konsilo donita al iu per paroloj aŭ per spertoj, kiu devas instrui al li pli ĝustan vidmanieron de spertoj aŭ teorioj.

— La lernolibro enhavas 50 lekciajn. La malsukceso ĉe ludo estis bona lekcio al li. Lekcioj de tiu profesoro ne estis speciale allogaj.

Makadamo. Sistemo de pavimado inventita de inĝ. Mac-Adam, konsistanta en uzo de disbatita kaj poste kunpremita gruzo.

— Gravaj vojoj estas nun ofte makadamitaj.

Manifestacio. Publika komuna ara proklamo de opinio per videblaj agoj kaj faroj.

— Manifestacio kontraŭ la milito. Niaj kongresoj estas granda manifestacio de la movado por la internacia lingvo.

Meliso (bot.). Grupo el la familio Labiaceoj.

Lozanĝo. Kvarangulaĵo kun kvar popare paralelaj egalaj lateroj, kun anguloj slantaj.

— Diagonaloj en lozanĝo estas perpendiklaj. Lozanĝa formo.

Menso. Kapablo kompreni, koni; animo en sia funkcio kompreni mondon.

— La plej granda bono de la homo estas la menso. Menso de la hundo.

— Komparu: Animo, Intelkto, Inteligenta, Racio.

Obtuza. Kio estas ne akra, malfacile penetras en ion, malagrabla diferencas de la atenda harmonio.

— Obtuzaj dentoj. Obtuzo doloro. Obtuzo sento. Obtuzo rimo. Obtuzo angulo.

Propozicio. Propono por primedito de iaj faktaj, kunigo de ideoj, kondiĉo de ia faro aŭ sekvo; esprimo de penso enhavanta subjekton kaj predikaton, se oni atentigas ilian enhavon, ne ilian formon gramatikan.

— Homo propozicias, Dio disponas. Kunigo de du difinitaj ideoj estas en logiko nomata propozicio. Propozicioj de la velocipeda konkurado.

Purgatorio (rel.). Loko aŭ stato por justaj animoj, kiuj ne povis dum la surtera vivo plenumi la nedaŭrajn punojn de la Dia justeco.

— Kredo je purgatorio estas kredartikolo de la katolika eklezio. Purgatoria flamo. Laŭ ŝerca popoldiro malfeliĉa geedza vivo estas purgatorio sur la tero.

** **Rekremento**. Materio, kiu restas post ia operacio kemia, aŭ post la serio de diversaj manipuloj en ia ajn miksaĵo. Restaĵoj eliminataj ĉe ia ajn teknologia procedo el la krudaj aŭ komencaj materialoj; ofte prilaborataj en specialaj industrioj.

— Vinbera rekremento estas uzata por fabriko de vino Petiota. Ĉe fabrikado de sodo laŭ Le-Blanca metodo rezultis kiel rekremento kalcisulfido.

* **Revelacio**. Ago de Dio, en kiu li per supernatura, transcendentia maniero aperigas la efektivan veron pri esenco de la mondo kaj spirito.

— Dio revelaciis sian leĝon direkte al Mozeo. Necese de revelacio estas fundamenta doktrino de la kristanismo.

Rikani. Rideti aŭ pro moko aŭ pro stulteco. — Junaj fraŭlinoj ordinare rikanas al amindumantaj maljunuloj. Se vi jam, ruzulo, gajnis mian monon, almenaŭ ne rikanu min! Rikana gesto.

Skolo. Komplekso de ideoj sciencaj aŭ artaj kunigita aŭ pro persono de ilia iniciatinto aŭ pro komuna maniero de pensado aŭ vidado.

— Skolo de Aristotelo estas nomata peripatetika. Skolo de Rembrand.

Skorzonero (bot.). Grupo el Kompozitoj hikoraceaj (chicoraceae), ofte manĝebla.

* **Soldo**. La plej malgranda monero de la samtempa monsystemo, kiu estas ankoraŭ en normala uzado; oni uzas la vorton metonimie, parto anstataŭ la tuto (pars pro toto) por nomi malgrandajn sumetojn.

— Soldo al soldo. Li elspezis la lastan soldon. Almenaŭ unu soldon donacu al mi. Ŝi ne havis eĉ unu soldon.

Spontanea. Farata sen ia devigado, memvole, tute libere; kio ne estas artefarita.

— Percepto de la mondo per la perceptiloj estas la unua spontanea ago de la infano. Spontanea faro. Spontanea nasko.

Stoplo. Partoj de grentrunketoj restintaj sur kampo post grenfalĉado.

— La plugilo renversas la stoplon. Stopla barbo.

Stulta. Malhavanta kapablon juĝi, imagi al si klaran ideon, memori ion pli gravan; malhavanta ingenion; al kio mankas logiko.

— Stulta persono. Stulta parolo. Li fanfaronas eĉ pro ŝia stulteco. Kampuloj estas ofte atentindaj pro sia malstulteco, tial oni diras: «kampula malstulteco» por montri deziron pliriĉigi sin per iaj ruzaj manieroj.

— Komparu: malsaĝa. Tiu belulino estas malsaĝa precipe en amaj aferoj, sed ne stulta.

** **Sugestio**. Ago naskigi ideon en la menso.

— Sugestioj de la sinami povas esti bonegaj. Li sugestis al ĉiu ajn respekton por sia persono.

Ŝoseo. Levita kaj firmigita tero apud la rivera bordo, laĝeto por bari la akvon, aŭ tra ia marĉejo por servi kiel vojo, aŭ levita vojo ĝenerale.

— Ŝoseoj estas konstruataj por diversaj celoj kaj laŭ diversaj metodoj. Supro de ŝoseo servanta por vojo ofte estas iom rondforma.

* **Ŝvebi**. Esti libere ekster la bazo sen ia ajn haltilo aŭ pendilo.

— La tero ŝvebas en universo. La aeroplano ŝvebas super la tero. Ŝvebaj fenomenoj spiritismaj.

Tosto. Festena mallonga parolado dum komuna manĝo.

— Dum edziĝa festenmanĝo oni ĉiam tostas je sano de la junaj geedzoj. La festeno finis per tosto al la gastiganto.

Tragika. Havanta malgajan aŭ teruran sorton, kiu estas kondiĉita de grandeco de homa celado.

— Tragika morto, ĉar ĝi okazis antaŭ plenumo de liaj celoj. Tragika kulpo.

Tramo. Reloj de traŭba fervojo, sur kiuj iras veturiloj diversmaniere movigataj.

— Tramo en la urbo estas en bona stato. Ne staru inter tramo, venas vagono. Tramveturilo estas pleneĝa.

Ukazo. Dekreto de la rusa registaro.

— Caraj ukazoj estis ofte rimarkindaj pro ilia nelogikeco aŭ severeco. Ukaza stilo.

Varianto. Malgrava ŝanĝo aŭ transformigo de ia logika problemo aŭ arta verko.

— Variantoj de simfonio. Variantoj de demonstracio de Pithagora propozicio. Diversaj variantoj de la mito pri Ifigenio. Variante de la sama teksto.

Viktimo. Estaĵo, kiu mortas aŭ suferas pro maljusteco aŭ tiraneco de iu; estaĵo, kiu suferis aŭ pereis pro konsekvencoj de iu faro aŭ okazo.

— La subpremanto kalumnias ofte la viktimon por justigi la subpremon. Viktimo de la devo.

oooo

XV-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN NURNBERG.

5a cirkulero.

1. Protektorato: Lia moŝto, prezidanto de ia Germana Respubliko Georg Ebert bonvolis akcepti la honoran protektorecon por la XVa.

2. Aliĝoj: Aliĝis ĝis fino de aprilo 2911 kongresanoj el 36 landoj. Bedaŭre ni devis sciigi, ke diversaj eksterlandaj samideanoj hezitas la aliĝadon, timante personajn malfacilaĵojn dum vojaĝo kaj restado. Konsternite pri tio, ni rapidas konstati, ke ne estas kaŭzo por tiaj timoj.

3. Kongreskotizo: Pro neantaŭvidita evolucio de la valutaj cirkonstancoj la projektita plialtigo de la kotizo deponit 1. junio ne okazos, escepte pro aŭstroj, germanoj, hungaroj, poloj kaj rusoj. Por la

lastnomitaj landanoj, pro certigo de budĝeto, plialtiĝos la kotizo de post 1. junio al 10.000.— gmk.

4. Kongresbanko: La kongresbanko estas la firmo Walk & Grün, Nürnberg. Ĝi starigos de 2a—8a aŭgusto apartan kontoron en la kongresejo.

5. Financoj: Ni preferas ricevi la kotizojn el eksterlando per monbiletoj. Tiuj kongresanoj, kiuj tamen ŝatas pagi per bankĉekoj aŭ transpagiloj, bonvolu uzi, por ŝpari al si kaj al ni spezojn, la jenajn bankojn kunigitajn kun la kongresbanko:

Ĉeĥoslovakio: Všeobecná česká bankovní společnost, Praha;

Jugoslavio: Kroatische Filiale des Wiener Bankvereins, Zagreb;

Hungario: Britische-Ungarische Bank, Budapest; Aŭstrio: Oesterr. Creditanstalt für Handel & Gewerbe, Wien;

Italio: Credito Italiano, Mailand;

Svisio: Schweizerische Bankgesellschaft, Zürich; Francio: Schweizerische Bankgesellschaft, Zürich;

Hollando: Rotterdamsche Bankvereniging, Rotterdam;

Anglio: Kleinwort, Sons & Co., London E. C. 3, 20 Fenchurch street.

6. Fakkunsidoj: Estas plue anoncigitaj la jenaj fakkunsidoj:

a) Univ. Esp. Asocio Junulara, adr. Aleks. Hirseman, Breslau, Herzogstrasse 36;

b) Vegetara Ligo Esperantista, adr. Oskar Büne-mann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrugchaussee n-o 586;

c) katolikoj, adr. J. Stahl, Jakobsplatz 17/II., Nürnberg;

d) Int. Ligo de Esp. Poŝtovicistoj (Ilepo), sup. reg. konsilisto O. Reber, Bamberg;

e) Franka Esp. Ligo: adr. la sama;

f) framasonoj: adr. C. Barthel, Frankfurt a. M., Wöhlerstrasse 14;

g) kursgvidantoj: adr. Emil Kreibich, Kladno (Bohemio), železářny;

h) instruistoj: adr. Hans. Kupper, Nürnberg, Parkstrasse 13;

i) eksmilitintoj kaj militviktimoj: Karl Dörfler, Mühldorf s./J., Bavario, Siedlungswerk.

7. Kongreslibro: La presado de la kongreslibro komenciĝis. Krom la oficiala parto ĝi enhavas ankaŭ reklamojn, kiuj peras unikan okazon por internacia negocia propagando. Ni petas ĉiujn samideanojn interesiĝi gravajn firmojn kaj societojn de ilia urbo, por ke ili rekte interrilatu kun L. K. K. Unu paĝo kostas 120.000, duona paĝo 650.000, kvarona paĝo 35.000 gmk.

8. Poŝtkartoj: Belaj ilustritaj poŝtkartoj pri Nürnbergaj vidindaĵoj kun esp. teksto jam nun estas livereblaj kontraŭ antaŭpago. La prezoj estas (inkl. sendkostoj) por 30 div. kartoj 4000, por 15 kartoj 2500 gmk.

9. Kongresaranĝoj: En la kadro de la oficiala programo okazos esperanto-prezentadoj: »Natan la Saĝulo« de Lessing kaj Mozarta opereto »Bastien kaj Bastienne«, instrument- kaj kantkoncertoj, diservoj en katolika, protestanta kaj hebrea ĉefpreĝejoj, internacia recitadmatinee, kabareda vespero, internacia kostumbalo kun enmetitaj popol-dancoj, komuna tagekursuro al Rothenburg, mond-konata mezepoka juvelujo. Laŭdezire ni aranĝos poŝtkongresajn ekskursojn al München (Alpoj) kaj Leipzig.

10. Vivkostoj: Ni ricevas ĉiutage demandojn pri la prezoj por loĝado kaj manĝado. Pro la mal-

stabileco de la cirkonstancoj estas ne eble jam hodiaŭ komuniki definitive dumkongresajn prezojn, pro kio ni prokrastas rilatajn detalajn sciigojn ĝis pli poste. Por provizora informo ni aldonas, ke la entutaj kostoj potage estas nuntempe: Unuaranga hotelo 50.000, duaranga hotelo aŭ komforta privatloĝejo 25.000, bona privatloĝejo kun manĝado en restoracio ĉirkaŭ 12.000, komuna manĝado kaj dumnoktado ĉirkaŭ 6000 gmk., ne enkalkulite la trinkaĵojn.

11. Vojaĝkostoj: Ĉar la somera horaro aperos nur en la venontaj semajnoj, ni povas komuniki rilatajn detalojn nur en la venontaj cirkuleroj, same pri fervojaj rilatoj de el landlimaj ĉefstacioj.

12. Blinduloj: Aligis por la IIIa ĝis nun 83 partoprenantoj el 12 landoj. La kongresejo estas la Blindula Instituto. Ĝi faros la eblon pri plej malkara gastigado; la senkosta restado dependas de la enirantaj donacoj, sed ne povas esti garantiata jam nun.

13. Policanoj. Laŭ interkonsento kun la prov. direktoro de T. P. L. la L. K. K. prenis nur sin ankaŭ la lokajn preparojn por tiu ĉi fakkongreso, kies kunvenoj okazos en la historia ejo de la »majstrokantistoj«. Urba polica patronaro estas certigita, senkostaj kuŝejoj disponigitaj. Pluaj detaloj en »Policisto«. **Loka Kongresa Komitato.**

0000

TERITORIO DE U. E. A. — RESPUBLIKO ĈEĤOSLOVAKA!

Teritorio de U. E. A. — Respubliko Ĉeĥoslovaka!

En la aprila numero de »Esperanto« estis publikigita aprobo de la komisiono de U. E. A. pri la starigo de nova teritorio »Respubliko Ĉeĥoslovaka«, voĉdonita de la delegitoj en fino de 1922.

La subskribintaj ĉefdelegitoj, transprenante sian oficon, adresas al la ĉeĥoslovaka esperantistaro jenajn vortojn:

1. Bonvolu vidi en ni oficistojn de U. E. A. — Nia ofico estas pure labora, ĝi celas daŭrigi la centran oficejon kaj samtempe intensigi la laboron por kaj per U. E. A. en la nova teritorio.

2. Ni dediĉos al la novaj taskoj nian plenan energion, sed ni atendas konfidon de niaj delegitoj, bonan volon kaj helpemon de ĉiuj UEA-anoj.

3. Ni agos metode laŭ nia plano, kies celo estas: firme enradikigi U. E. A. organizi en nia teritorio, simplikigi kaj plirapidigi la administradon, plene apliki la aranĝojn pri servoj. — Tiamaniere nia laboro alportos bonon al U. E. A., al la esperantista movado ĝenerale kaj samtempe al la loĝantaro de nia ŝtato.

4. Tute ne celante oficiale dividi nian ĵus kreitan teritorion, ni tamen tre ŝatus trovi helpantojn slovakajn kaj hungarajn en Slovakio kaj rutenan en la Subkarpata Rusio. Energiaj kandidatoj skribu al O. Skleněčka en Hradec Králové.

5. Nia celado estas ne nur praktika, sed ankaŭ ideala: Se ĉiuj niaj delegitoj kaj membroj zorge trarigados la statuton de U. E. A. kaj se ili konstante legados nian »Esperanton«, ni firme kredas, ke ni sukcesos efektiviĝi en nia nova teritorio ankaŭ la idealajn flankojn de la UEA-celado, kreante internacian, harmonian anaron, kiu fariĝos brila ekzemplo por nia publiko neesperantista!

Ni du solaj povos fari nur malmulton — ĉiuj kune ni faros miraklojn!

O. Skleněčka en Hradec Králové. — Hans Klinger en Bodenbach.

Progresoj en Ĉeĥoslovakio.

Al honora Komitato de Ĉs. Asocio Esp. aliĝis 60 ĉeĥaj eminentuloj, inter ili 3 ministroj, 20 profesoroj de universitatoj kaj teknikaj altlernejoj, verkistoj, artistoj, ĵurnalistoj, membroj de Ĉeĥa Akademio de sciencoj kaj artoj, deputitoj kaj senatoj. — Nombro de la membroj de CAE. pligrandiĝis en j. 1922 je 30%.

La 25. de marto 1923 okazis en Praha la IV. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, kiun partoprenis 60 samideanoj el 14 lokoj de la respubliko. El la prezentitaj raportoj ni citas:

Raporto de s-ro Hromada, ĝenerala sekretario, pri la laboroj de CAE en la lasta jaro: Asocio aranĝis la I. kongreson de esp-istoj el ĈSR. kune kun la Ligo de germanaj esp-istoj. Rezultato estis fondo de IDR — internacia delegitaro respubliko — komitato de 6 personoj preparantaj komunajn entreprenojn de tutregna signifo. Asocio aranĝis statistikan enketon pri instruado de esp. en mezgradaj kaj fakaj lernejoj por prezenti la materialon al la Pedagogia konferenco en Genève. — Aranĝis paroladon de prof. Bovet, dir. de la Pedagogia instituto J. J. Rousseau, kune kun Filozofia Societo kaj Franca Klubo. — Respondis detalan demandaron de la Ligo de nacioj pri esp. movado. — Sukcesis havigi vizan rabaton por partoprenantoj de la kongreso en Helsinki. — Eldonis diversajn flugfoliojn, inter ili tiun de d-ro Kamaryt: L. I. kaj aŭtoritatoj. — Eldonis 3000 ekz. de la ĉeĥa traduko de la Raporto pri E. en la Ligo de nacioj kaj dissendis ĝin al ĉiuj personoj eminentaj en la publika vivo. — Starigis Honoran komitaton por subtenigi la movadon. La rezultaton ni citas en la titolo. Detaloj estos ankoraŭ sciigitaj. — Eldonis ĉeĥan tradukon de Manifesto al instruistaro de la tuta mondo — ktp.

Membrolibro de CAE enhavas fine de la lasta jaro 1270 membrojn. Kompare kun la nombro 930 en j. 1921 ĝi signifas kreskon de 340 novaj, do 36%.

Raporto de s-ro Ginz, gvidanto de la Propaganda Sekcio de CAE: 176 membroj aliĝis, pleniĝinte specialan demandaron kaj espriminte konsentan dediĉi unu duonhoron semajne por laboroj de P. S. Krom samideanoj de Praha, 44 membroj kunlaboris konstante. Al ili mi sendis po 78 notoj pri progresoj de E. kaj ricevis de ili 265 gazetnumerojn, enhavantaj represon, plue 138 artikolojn pri E. kaj 126 notojn pri klubo agado. En ĵurnaloj de Praha krom tio 431 notoj pri progresoj de E., entute por 1922 ni ricevis pruvojn pri 960 notoj en 115 gazetoj. Ni ne kalkulas la gazetojn, kies eltranĉaĵojn ni ne ricevis. — Ekspozicia materialo migris de unu loko al alia. — P. S. helpis starigi ekspozicion de 105 gazetoj esp. en I. internacia ekspozicio gazetara en Praha, decembro 1922.

Laŭ la raporto de f-ino Vlčková, CAE kolektis por malsatantaj rusaj samideanoj ĉ. 4.000 Kč kaj forsendis por ili 25 paketojn kun manĝaĵo kaj 3 paketojn kun vestoj. Bedaŭrinde neniu el la ricevintoj informis nin senpere kaj tiel ni havas sole oficialajn kvitancojn de la Petrograda Grupo.

Laŭ la raporto de d-ro Kamaryt la Ekzamena komisiono de CAE kunvenis dufoje kaj donis 2 atestojn pri kapableco instrui kaj 3 pri scio de E. — Ekzamena Regularo estis eldonita prese.

Laŭ la raporto de s-ro Novák, kasisto, CAE enspezis kotize Kč 2324.—, donace 5714.—, profito de teatra prezentado Kč 1422.—, profito de

librovendado Kč 408.—. Preskaŭ ĉion oni eldonis por propagando kaj preso de la broŝuro kaj flugfolioj. Sekve de tio la kunveno post pli longa debato unuanime akceptis la proponon, la membroj de CAE krom la kotizo pagu unu kronon monate por la propagando. Per tiu ĉi relative malgranda oferdono CAE povus disponi la notindan sumon 12.000 Kč jare.

Fine ni citas, ke la kunveno konsentis kun la propono de s-ro Hromada: Esprimi al Esperantista Akademio bedaŭron pro tio, ke por la novaj elektoj de LK-anoj la Akademio mem starigis la kandidatan liston por la ĉeĥa lingvo, neniel demandinte opinion de CAE. Hmd.



KULTURO



Memorindaj datoj en majo. La 1. m. 1904 mortis Ant. Dvořák, la ĉeĥa komponisto. — La 3. m. 1645 Svedoj eksciĝis Brno (por 15 semajnoj). — La 4. m. 1919 mortis per akcidento la unua ĉs. ministro de nacia defendo Milan R. Štefánik, revenanta per flugaparato en la liberigitan landon. (Laudire lia aparato estis forpafita de insida atakanto.) — La 5. m. 1821 mortis Napoleono Bonaparte. — La 7. m. 1840 nask. P. J. Čajkovskij, la rusa komponisto. — La 8. m. 1794 estis ekzekutita franca ĥemiisto Lavoisier. — La 9. m. 1805 mortis Friedrich Schiller, germana poeto. — La 12. m. 1884 mortis B. Smetana, ĉeĥa komponisto. — La 13. m. 1809 Napoleono venkoakiris Vienon. — La 14. m. 1316 nask. la ĉeĥa reĝo kaj roma imperiestro Karolo IV., de ĉeĥoj nomata »patro de la patrujo«. — La 16. m. 1868 estis fondita »Nacia teatro« en Praha. — La 17. m. 1742 la prusa reĝo Friedrich II. venkis aŭstrianon apud Chotušice. — La 18. m. 1848 konstituigis regna parlamento en Frankfurt a. M. — La 19. m. 1790 en Francujo estis nuligitaj nobelaj privilegioj. — En j. 1906 estis malfermita I. Germana Esp. kongreso en Braunschweig. Fondo de Germ. Esp. Societo. — La 20. m. mortis sveda generalo Banner. — La 21. m. 1506 mortis Kristoforo Kolumbus, malkovrinto de Ameriko. — La 23. m. 1493 estis bruligita reformisto Girolamo Savonarola. — La 24. m. 1618 komencis en Praha ĉeĥa ribelo kontraŭ Habsburgoj. Komenco de »tridekjara milito«. — La 26. m. 1876 mortis Frant. Palacký, ĉeĥa historiisto. — La 27. m. 1905 ruinigo de rusa ŝiparo apud Čuŝima. — La 29. m. 1453 turkoj venkoakiris Konstantinoplon. — La 30. m. 1907 la Internacia Asocio de la Akademianoj deklaris sin en Vieno nekompetenta elektj helpan lingvon internacian.

Memorindaj datoj en junio. La 2. j. 1848 estis en Praha malfermita »Slava kongreso«. — En jaro 1887 aperis la unua lernolibro de Esperanto sub titolo: D-ro Esperanto, Lingvo internacia. Antaŭparolo kun plena lernolibro. — La 3. j. 1910 estis en Petrograd mali. I. rusa kongreso esp. — La 5. j. 1783 okazis la unua ekflugo de Montgolfier per balono. — La 6. j. 1861 mortis C. Cavour, la unuiginto de Italujo. — La 9. j. 1781 naskiĝis J. Stephenson, la elpensinto de lokomotivo. — La 13. j. 1794 okazis terura erupcio de Vesuv. — En jaro 1910 estis malfermita I. kongreso de anglaj esperantistoj en London. — La 15. j. 1389 okazis la fama batalo sur Kosovo. — En 1910 malfermo de I. tutaŭstria esp. kongreso en Wien. — La 18. j. 1815 malvenkis Napoleono apud Waterloo. — La

21. j. 1621 okazis en Praha terura ekzekuto de 27 ĉefaj nobeloj sur placo Staroměstské náměstí. — La 23 j. 1633 estis Galileo Galilei devigita revokisian doktrinon pri rotacio de terglobo — La 25. j. 1254 venkato de tataroj apud Olomouc. — La 27. j. 1909 malfermo de la I. belga kongreso esp. en Verviers. — La 28. j. 1712 nask. J. J. Rousseau, franca filozofa. — La 29. j. 1793 nask. Jos. Resl, aŭtoro de ŝipa ŝraŭbo.

La Gregora Kalendaro.

La 2-an de marto, kuranta jaro, ankaŭ en Grekujo komencis leĝa uzado de la Gregora Kalendaro, kaj el tia dato, la kalendaro publikita de Gregoro XIII. jam de 341 jaroj, atingas fine ĉiujn landojn de la mondo.

La Gregorkalendaro validis la 5an de Oktobro 1582 kaj tiu tago fariĝis la 15an de oktobro 1582.

La katolikaj ŝtatoj tuj akceptis tian reformon, sed nur pli poste, sekve de multaj diskutoj, estis akceptata de la protestantaj ŝtatoj, pro ilia malfavoro por la papo: Germanujo ĝin akceptis en 1700, Svisio en 1701, Anglujo en 1752, Svedujo en 1753.

Rusujo kaj Balkanio, fidelaj al ortodoksa eklezio, ne volis iam ĝin akcepti, kaj anstataŭ ol esti en malakordo kun la papo greferis esti en malakordo kun la suno. Preskaŭ ĝis nun, precize ĝis la eŭropa milito, la Greko-Rusoj estis la solaj en tuta mondo, kiuj uzadis la kalendaron de Julio Cezaro. Post la jaro 1900 ĝi estis 13 tagojn malfrue rilate l asuno kurso.

Ĉiuj nacioj de Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko kaj Oceanio jam de tempo praktikadis la gregorkalendaron; ankaŭ la malproksima Japanio estis ĝin akceptinta.

Nur Rusujo kaj Balkanio estis escepto al tia unuformeco.

Sed la alternoj de la milito kaj iliaj politikaj kaj sociaj konsekvencoj realigis per surpriza facileco tion, kion oni jam kredis nerealegebla reformo. Rumanujo, Bulgarujo, Turkujo, Rusujo, Serbujo, unu post alia akceptis la gregorkalendaron ne renkontante eĉ la plej malgrandan malfacilon inter la popolo.

Pro ekscesa fideleco al antikva tradicio, Grekujo rezistis ankoraŭ al influo de la moderneco kaj restis tute izolata.

Sed tia unikeco ne povis daŭri eterne. Fakte la 2an februaron ĝi rompita katenojn de la hieratismo kaj je tia dato en Grekujo ne estis la 18an de februaro sed ja, kiel ĉe ĉiuj aliaj nacioj, estis 2a februaro 1923.

En la religia medio tamen validos ankoraŭ la antikva tempokalkulo, la nova ne estos praktikata kaj la festo de la ĉirkonvizio okazos ĝuste kiam en la gregorkalendaro aperos la 13a januaro kaj sekve ĉiuj aliaj religiaj festoj malfruiĝos je tridek tagoj.

G. Meazzini.

Alvoko al la Esperantistoj stenografistoj.

Kelkaj gekolegoj — esperantistoj kaj stenografistoj — formis provizoran komitaton, por celi la kreon de internacia asocio de esperantistoj stenografistoj.

Tiu asocio laboros por propagandi Esperanton en la stenografistaro, kaj stenografon en la esperantistaro.

Tiu societo zorgos same por instrui la junajn kolegojn, kiuj volos stenografi la internacian lingvon; por prisciigi siajn membrojn pri la dis-

vastigo de l' stenografo en la diversaj landoj; por la verkado de teknika vortaroj ktp.

Nune la provizora komitato eldonas »Rondirantan Gazeton« atendente, kiam la societo estos fondita kaj iom forta, por eldoni pli gravan gazeton teknikan.

Kiu volas helpi la starigon de tiu asocio — kies kotizo kostos mallkare — estas petata sin turni al la provizora sekretario: S-ro P. Flageul, 9, Boulevard Voltaire, en Issy (Seine), Franclando.

Aliaj gazetoj bonvolu represi.

DIVERSAĴOJ

Ni atentigas, ke la venonta numero de »La Progreso« aperos en septembro. Al niaj legantoj kaj amikoj ni deziras agrablan uzon de ilia libertempo.

Nova oficiala aprobo de eduka valoro de esperanto de ĉeĥoslovaka lerneja ministerio. Per la dekreto de ĉeĥoslovaka ministrejo de instruado el 11. aprilo 1923 n-ro 44457/1 (Ministreja Bulteno el j. 1923 n-ro 4. p. 217 kaj 213), per kiu oni publikas instruplanojn por civitanaj instruoj kaj eduko en lernejoj elementaraj, civitanaj kaj unujaraj kursoj ĉe civitanaj lernejoj, oni ordonas en la III. grado (klaso) de elementara lernejo (6a—8a jaro lerneja) kaj en la civitana lernejo ankaŭ ekzercojn en civitana eduko. Le dekreto tiel difinas iliajn enhavon kaj metodon: Por elementaraj lernejoj: »3. Ekzercoj. Aŭtonomio de lernatoj en amplekso, kiel ĝin permesas la natureco de lernatoj kaj lokaj cirkonstancoj. Instigi la lernatojn, ke ili fondu por si taglibron, en kiu ili enskribus siajn farojn, por povi mediti pri ili kaj aranĝi laŭ ili sian agadon kaj konduton. Organizo de bonaj faroj. Aktiva amo al la proksimulo. Unua helpo. Sekcio de Junularo de la Ruĝa Kruco. Internacia korepondado kaj intersanĝo de poŝtkartoj, esperanto ktp.« Por la civitanaj lernejoj ĝi estas ordonita analogie per jenaj vortoj: »3. Ekzercoj. Lerneja aŭtonomio. Sekcio de Junularo de la Ruĝa Kruco. Unua helpo. Propra lerneja apoteko. Kristnaskaj donacoj por orfoj, blinduloj, kripluloj k. a. malriĉuloj. Kunvenoj, prelegoj, teatroj k. a. Aranĝo de propraj kunvenoj kun maturuloj, precipe gepatroj. Laboro en lerneja ĝardeno. Ekskursoj en memorindajn lokojn, en naturon k. s. Vizitoj de oficoj, institutoj, fabrikejoj kaj metiejoj. Libro de vivo (enskriboj de lernantoj koncerne la moralan parton de ilia vivo). Internacia korespondado, intersanĝo de poŝtkartoj, esperanto k. a. Uzo de ĉiuj taŭgaj okazoj, kiujn donas la vivo lerneja, vivo de proksima eĉ iom malproksima ĉirkaŭo kaj vivo nacia.« — Dr. Stan. Kamaryt.

Pri konferenco en Venezia. Pri konferenco en Venezia raportis en longaj artikoloj, verkitaj de s-o Pitlík, la 11. apr. ĵurnalo »Tribuna« (je komerca vidpunkto) kaj 6. majon dusemajna faka gazeto »Hotelier« (je hotela vidpunkto), aldoninte esperanto-ĉefan dupaĝan manĝokarton. (La manĝokarto estas aĉetebla por Kč 1.50 ĉe la administrejo de »Hotelier«, Praha II., Zlatnická 3.) — Rondeto de esperantistoj en Praha aranĝis la 28. apr. en Ženský klub publikan paroladon de s-o Pitlík pri »La rezultoj de la konferenco en Venezia kaj la ĉefaj komercaj interesuloj«, kiu estis akompanata per lumbildoj, jetataj de s-o Koutek pere de la mikroskopo. Enkonduk-parolon faris f-ino Šupichová. — La komerca ĉambro en Praha aranĝis la 22.

majon en sia sekcia ĉambro informan paroladon pri »Esperanto kiel komerca lingvo kaj la rezultoj de la konferenco en Venezia«. La referentoj estis A. Pitlík, oficiala konferenca delegito de la ĉs. komercministrejo, Foiro de Praha, Klubo de ĉs. turistoj kaj Centro de ĉs. turismaj asocioj, kaj s-o R. Hromada, ĝen. sekretario de Ĉs. Esp. Asocio.

Zamenhova monumento. Kiel »La Progreso« jam menciis, internacia konkurso por starigo de Zamenhova monumento estus estinta en intereso de poresperanta propagando inter la tutmondaj artistoj plirapidigi kaj plimultigi la monokolekton. Ĝisnunaj mondonacoj: 130 sterlingaj funtoj, el kiuj 100 sterl. funtoj donacis la angla, 20 sterl. funtoj la nederlanda kaj s-o le 10 sterl. funtoj la tutmonda esperantistaro!

Novaj lingvokomitatoj. Krom s-o Kühnl, kiu estas samtempe esperantista akademiano, por la Ĉeĥoj ĵus estis elektitaj kiel lingvokomitatoj: f-ino Šupichová kaj s-o Pitlík, kies oferemaj kaj sukcesplenaj propagandaj kaj fakaj laboroj, konataj ne sole al la proponinta Akademio kaj tutmonda esperantistaro, sed ankaŭ al la ĉeĥaj veraj esperantistoj, tute pravigas ĉi tiun honorigon. —

La IVa kunveno de okcidentbohemiaj esperantistoj okazis la 10. junio t. j. en Plzenec. La riĉa programo de la laborkunsido, la bela pejzaĝo kaj la trarigardado de la malnova ruino de la kastelo Radyně, la belega panoramo vidita de ĝi kaj la trarigardado de la fame mondkonata bierfabriko de Plzenec bone ekzamenis la 65 ĉeestintoj. Al la sinjoro prokuristo de la nomita bierfabriko, la samideano Chaloupka, ni kore dankas pro la afabla klarigado dum la trarigardado de la bierfabriko, pri kies grandeco oni povas al si fari imagon jam per tio, ke antaŭ la milito oni tie kuiris jare 105.000 hl da biero, kaj ke de tiu kvanto unu duono estis por eksporto. Eĉ trans la oceano oni de tiu sola bierfabriko eksportis 20.000 hl da biero jare. Nune oni tie eksportas eĉ eminentan malton, disvendebila por fabrikado de biero de pilsena kvalito. Ni deziras al la bierfabriko de Plzenec kaj al la samideano Chaloupka bonajn pluajn sukcesojn.

Esperanto sur Orienta Foiro en Bratislava. Dum la 3. Foiro de Bratislava kunvenos faka konferenco de komercistoj-esperantistoj por konsili sin pri utiligo de rezolucioj kaj informoj de la Venezia Konferenco. En la Foiroj pavilonoj estos aranĝita ampleksa ekspozicio de dokumentoj pri praktika uzado de esperanto en komercio. Ĉiuj interesuloj estas kore invitataj al partopreno en tiu ĉi konferenco. Ili anoncu sin kiel eble plej baldaŭ ĉe d-ro St. Kamaryt en Bratislava, Tělocvičná 3.

Esperanta kurso en Vlašim. La 7an de majo de t. j. komenciĝis kurso en Vlašim en loka lernejo. Ĝis nun estas 25 aliĝintoj. Kurson vizitan nur 4 viroj, ceteraj estas virinoj, precipe fraŭlinoj. Kurso estas gvidata de Alois Štěpán, lernejestro el Domašín unuope en semajno.

La prusa ministerio de internaj aferoj dissendis al la policiaj oficoj demandilojn pri la policistoj parolantaj esperanton.

La ekzamenoj. La ŝtata ekzamena komisiono por komunaj kaj burĝaj lernejoj aprobis en aprila ter-

mino sufiĉan kapablon instrui Esp.-on en burĝaj lernejoj de jenaj kandidatoj: Štěp. Bálková, instruistino en Žižkov; Julie Bendová el Praha; Lud. Dandová, oficistino en Praha; Frt. Hahn, instruisto en Škvrňany; Stan. Hauner, faka instr. en Zatec; Helena Hlaváčová, instr. en Praha; Al. Horáček, instr. en Kutná Hora; Mat. Louda, magazen. en Praha; Jindř. Sláviková, ofic. en Praha; A. Zedníková el Praha.

Esperanto-movado en Přeřov. Antaŭ unu jaro oni eĉ ne sciis pri la Esp. movado en Přeřov. La tutan movadon disvolvis preskaŭ unu homo, la nuna prezidanto de la societo s-o Malík. Li aranĝis propagandan paroladon kaj post ĝi la Esp. kurson. Antaŭ la nova jaro oni komencis jam la duan E. kurson kaj fondis dumtempe neoficialan E. rondeton. De aprilo de tiu ĉi jaro ekzistas jam oficiala E. societo. La nomita societo havis en aprilo sian unuan ĝeneralan kunvenon, kiun ĉeestis 50 personoj. Nune havas jam la societo 60 anojn. Por aŭtuno preparas la E. societo en Přeřov grandan propagandan feston kunigitan samtempe kun reala ekspozicio de Esp.-aĵoj. Ĉar la nomita societo ne havas tiom da materialo, petas E. societojn, ke ili helpu en ĝia malfacila tasko per afabla prunto aŭ donaco de Esp.-aĵoj, ekzemple: Libroj, gazetoj, lerno- kaj legolibroj, gvidlibroj, broŝuroj, katalogoj, kantaroj, ilustritaj revuoj, presaĵoj, diversaj kolektoj, fotoĝrafoj, diversnaciaj kostumbildoj, brodaĵoj, kongresafiŝoj, poŝtkartoj, poŝtmarkkolektoj, propagandiloj, glumarkoj, propagandiloj de internaciaj specimen-foiroj, publikajoj de ĉiuj fakoj ktp. La afable pruntitaj Esp.-aĵoj estos post fermo de la ekspozicio kun kora danko de E. societo en Přeřov al pruntintoj en sendifekta stato resendataj. Esperantaĵoj estu afable direktataj al la sekretario: Eduard Zatloukal, Přeřov, Ĉeĥova n-ro 10, Ĉeĥoslovakujo. Pruntoj estu notitaj per signo P, eventualaj donacoj per signo D.

La esperantistoj de Mor. Ostrava kaj ĉirkaŭaĵo intencas viziti la industrian kaj metian ekspozicion en Vítkovice-Mor. Ostrava la 8an de julio 1923 komune, por propagandi tiamaniere nian karan lingvon. Rezervu vian viziton al la ekspozicio ĝis tiu tago por pligrandigi la nombron de la esperantistoj! Programo por la 8an de julio 1923, la elektita tago: 8—10 horo kunveno de la esperantistoj en hotelo Nacional; 10—12 horo rigardo de la urbo; 12—13 horo laŭvola komuna tagmanĝo; 1/2 14 horo (1 horo 30 min. posttagmeze) komuna marŝo en la ekspozicion. Kiu volas resti en Ostrava du tagojn kaj deziras loĝejon, devas pri tio interrilatiĝi kun s-ro Janečka Arnošt, Vítkovice, Republikánská 28, kiu donas ĉiujn informojn.

.....

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresado kosta 2 Kč.)

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmarkoj.)

Berlin-Niederschönhausen, Körnerstr. 4. — S-ro prof. Dyba. Per flugpoŝtafrankita letero rekomendita mi sendas 500 diversajn poŝtmarkojn ĉiulandajn aŭ div. germanajn por 7 Kč, 1000 div. ĉiulandajn aŭ 300 div. germ. por 25 Kč.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radvišská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.

